Carlos Senprún-Maura

Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Katalunio (1936-1937)

Originala eldono: *Révolution et contre-révolution en Catalogne (1936-1937)*. Esperantigis Jurgo Alkasaro el la hispana eldono: *Revolución y contrarevolución en Cataluña (1936-1937)*. Barcelono: Tusquets 1978 (Tr. Julia Escobar)

"Nur kiam la historiistoj estos forlasintaj siajn antaŭjuĝojn, ili povos komenci seriozan studadon pri la popola movado, kiu kapturnis la respublikan Hispanion kaj produktis unu el la plej gravaj sociaj revolucioj de la historio."

Noam Chomsky

Antaŭparolo al la kastilia eldono

Mi verkis tiun ĉi libron je la jaroj 1969a-1971a, kiam ankoraŭ ne plentrankviliĝis la eksplodo de majo-junio de la 1968a en Francio, kaj kiam temoserio, nova por multaj, nutris agojn, diskutadojn, projektojn, gazetojn kaj librojn. Inter tiuj temoj estis, memkompreneble, tiu de la liberecanaj revolucioj kaj tiu tiom uzata kaj misuzata de la memrego. Ŝajnis al mi logike kaj preskaŭ evidente partopreni laŭ mia kielo tiujn diskutojn kaj la kritikon al la totalitarismo (ĉu "blanka" ĉu "ruĝa" faŝismo), verkante libron pri la "memregantaj" spertoj ĉe Katalunio kaj Aragono je la 1936a-1939a, pri kiuj oni sciis tiam preskaŭ nenion ĉe Francio. Mi mem estis malkovranta la gravecon de la afero, dum progresis la pretigado de la libro kaj la serĉo kaj kapto de datenoj kaj dokumentoj.

Paralele, ĉe la Parizaj eldonejoj modiĝis havi maldrekstreman angulon, por kontentigi novan junulan klientaron kaj pligrandigi tiel la profitojn de la respektivaj entreprenoj.

Tamen tiu ĉi libro estis migranta el eldonejo al eldonejo sen trovi rifuĝejon, ĝis kiam "mirakle" ĝi trafis respektindan kaj origine katolikan eldonejon (Mame), sed kiu, senveliĝanta, klopodis ankaŭ ĝisdatiĝi. Mi ne plifortunigis ĝin, ĉar ĝi malaperis tuj, alfundiĝante per la plej absoluta bankroto.

Mi modifis nenion de la franca eldono, mi nur forigis la mallongan enkondukon, kiun la franca eldonanto petis al mi, por klarigi al la eblaj transpirineaj legontoj iom pri la kataluna nacia afero. Enkonduko, kiu malmulte povus alporti al la eblaj hispanaj legontoj, kiuj povas informiĝi –okaze ili ne informiĝis jam– tagtage kaj pli bone per aliaj libroj aŭ simple legante sian kutiman ĵurnalon, despli nun, kiam la *Generalitat* estas restarigita... Mi profitis tamen –kaj tion mi deziras rediri tie– tiun mallongan rezumon pri la kataluna naciismo por manifesti mian plej decidan rifuzon de ĉia naciismo.

Mi modifis nenion kaŭze nursole de la pigro, ĉar multaĵon povus esti modifita kaj plibonigita, rimarkante ankaŭ, ke pri la kolektivigoj kaj aliaj ĉitraktitaj temoj aperis pluraj postaj libroj. Ankaŭ mi lasis senŝanĝa iomajn pli aktualajn rimarkaĵojn, ekz-e la lastajn paragrafojn, per kiuj mi aludis la hispanan situacion ĉe la momento verki tiun libron, t.e. ankoraŭ sub la frankismo.

Memkompreneble neniu povis aserti tiam, ke, mortinta Franco, la frankismo malaperos tiel rapide kaj pace, kaj ke la ĵus debutinta demokratio estis kondukonta Hispanion plenvele kaj ventopoŭpe ĝis la Banaleco. Banaleco preferinda laŭ mi al la faŝismo, kun aŭ sen ties frankistaj ecoj. Tamen tio ne malhelpas, kaj gravas substreki tion, ke la revoj kaj deziregoj revoluciaj (oni rajtas aldoni citilojn laŭvole) restas nuntempe flankenlasitaj.

Kaj evidente tio puŝas deflankigi tiun libron sur la plej senespera breto de la bibliotekoj, en kiu kunpremiĝas la *prihistoriaj* libroj, t.e., tio, kio okazis kaj neniam plu okazos denove.

Mi asertas tion, ĉar inter tiu libro kaj iuj legantoj povas aperi la miraĝo de la "ekzemplo" kaj la iluzio de la "ripeto". Io kiel kredi, ke tio, kion entreprenis la liberecanaj laboristoj je la 1936a, tiun sendube ĝisfundan socian revolucion, estas hodiaŭ reentreprenenda kaj daŭrigenda ĝis ties lastaj konsekvencoj. Nura miraĝo, mi rediras.

Eble la teksto mem estas "kulpa" pri la naskiĝo de tiaj iluzioj, eble mia propra entuziasmo, malkovrante la gravecon de la tiama socia revolucio, povas konfuziĝi kun ia "klara kaj simpla perspektivo por la hodiaŭo": sufiĉus reiri la saman gloroplenan vojon. Do ne. Neniam mi kredis, ke la historio povas ripetiĝi kaj des malpli tiu konkreta historio.

Evidente neniu libro, malgraŭ tio, kion kredas la marksistoj-leninistoj ĉiam serĉantan la bonan programon, povas alporti *la* revolucian solvon, ĉar ĉio, kio estis kaj estas revolucia en la mondo, estas ĉiam *neantaŭvidebla* kaj *spontanea* kaj sekve *superas* kaj kadukigas tuj ĉiajn programojn. Kvankam poste la marksistaj historiistoj klarigus al ni, ke ĉio okazis, ĉar Lenin prenis kafon proksime de la epicentro de la okazintaĵoj.

Se la ripeto de tio okazinta ĉe Katalunio je la 1936a-1937a ŝajnas al mi absolute malebla, tio estas nur, ĉar la hodiaŭa hispana socio tre malsimilas tiun de la 1936a. Tial la kontraŭŝtata, kontraŭaŭtoritata, liberecana, promemrega lukto (mi scias perfekte, ke tiu lukto *ne ekzistas* hodiaŭ ĉe Hispanio, temas pri nura hipotezo), okaze ĝi ekzistus, devus reelpensi ĉion de la komenco ĝis la fino.

Por klarigi komplete la ŝanĝojn okazintajn ĉe la hispana socio (kaj ĉe la mondo), tiel ĉe la menso kaj la konduto kiel ĉe la industrio kaj la terkulturo, ĉe la sociaj klasoj kaj la rolo de la ŝtato ktp, necesas libro kaj ne sufiĉas la malmultaj linioj de antaŭparolo. Tamen estas facila afero por la leganto kompari tion, kio okazis la 1936an (kaj kion mi rakontas post multaj aliaj), kaj tion, kion li spertas tagtage. Nenio simila. Krom la "eternaj valoroj" de la libero kaj la justo, kiuj, ĉar eternaj, ne interesas min.

Tamen ne nur oni klopodas ripeti la historion, sed oni faras nenion plu. Ĉiuj la antikvaj tombejoj estas kapturnitaj. Oni elterigas la malnovajn kadavrojn de la anarĥi-sindikatismo, la malnovajn gloriaĵojn, la malnovajn mumojn, la malnovajn standardojn, la malnovegajn statutojn, kaj oni klopodas daŭrigi la gloroplenan historion de la CNT. Kaj tiel iras la aferoj.

La hodiaŭa CNT estas nenio krom malbona karikaturo de la hieraŭa CNT. Kaj tio estas ne nur logika, sed estis ankaŭ antaŭvidita. Mi kredas esti montrinta per la sekvantaj paĝoj ĉion kontraŭdiran, kion enhavis la anarĥi-sindikatista teorio kaj la praktiko de la 30aj jaroj. Sed hodiaŭ kaj precipe pro la ŝanĝoj okazintaj ĉe la hispana socio, la nocio mem de anarĥi-sindikatismo estas disrompita kaj neniigita, ĉar en socio kiel la hispana kiu ajn sindikato povas esti nenio krom speciala ilo por integrigi la laboristojn en la socio, ilo por *kontroli* kaj *regi* (kaj sekve por bremsi) la

malkontenton kaj la ribelon. Ĝuste, sekve, la kontraŭo de la anarĥiismo, okaze tiu vorto enhavus ankoraŭ ian sencon. Tion oni rajtas pridubi.

La "renaskiĝanta" CNT estas ja konsistigita de homoj, kiuj sub la samaj komencliteroj havas celojn ne nur malsamajn sed ankaŭ kontraŭdirajn, sed tio, kio elstariĝas dum la lastaj monatoj de agado –unue tolerata, laŭleĝa poste–, atentante la agojn ne la bonvolajn deklaraciojn, estas, ke la CNT diferenciĝas per nenio minimume interesa de la kromaj sindikatoj: lukto pro la heredaĵo de la CNS[a], proamnistiaj petoj, procesioj kun standardoj kaj krietoj, intertraktoj pri la interkonsentoj ktp., la sama straso kiel la burokrataj sindikatoj. Kaj ni ne parolu pri la karikaturo de la karikaturoj, la mallumega *happening* de tiuj, kiuj pretendas restatigi la FAI-n, kaj tial ili dormas unufoje ĉiu semajno kun pistolo subkusene kaj revas esti Durruti (kiu estas tute sanktigita, kaj pri kiu oni devas komenci trakti per minimume kritika atento).

Ĉiuj la indignoj kaj alibioj povas nenion kontraŭ la fakto, ke en tiuj konfliktoj, en kiuj aperas io nova, malsimila, moderna, liberecana (ekzemple ĉe Vitoria aŭ ĉe Roca), la CNT *forestis*. Ĝi apogis¸ aŭ aplaŭdis simbole, tamen ekstere. Ĉe tiuj kaj aliaj okazaĵoj estis la laboristoj mem, kiuj, rifuzante la prointeresan helpon kaj eĉ pli la gvidadon de *ĉiuj* partioj kaj sindikatoj, kondukis sian lukton demokratie per suverenaj asembleoj.

La sola novaĵo estas la festema sinteno, la enkonduko de la nocio pri festo en iujn mitingojn kaj tagaĵojn de la CNT. Sed, kvankam rompi kun la ritualo de la mitingo-meso estas simpatia kaj nova afero, nepras du rimarkaĵoj: 1a) la enkonduko de festo en la mitingon, de gaja "petolaĵo" en la meson, produktis jam skandalon kaj baldaŭ estos forpelita de "la vicoj de serioza organizaĵo kiel la CNT"; kaj 2a) tiuj, kiuj pensas, ke la menciitaj festemaj manifestacioj movos eĉ unu sola milimetro la reĝan seĝon aŭ tiun de ties ĉefa ministro –ĉu Suárez ĉu González–, pretigas la ĉefan seniluziiĝon de sia vivo. Memkompreneble, por la plejmulto de la nunaj "dibocŭloj " temas nur pri ĝui plurajn amuzhorojn, kaj tio, kiel ne!, gravas, sed ne preterpasas tiun tiom gravan kiom limigitan celon.

Rezume: tiu ĉi libro estas neniu lernolibro, per kiu oni klarigas, kiel restarigi hodiaŭ, morgaŭ aŭ aliiam surbaze de la estintaj spertaĵoj la liberecanajn kolektivigojn ĉe Katalunio, Aragono –aŭ Ekstremaduro–, nek la barikadojn ĉe Barcelono. Okaze ĝi enhavas ion interesan, tio estas precize, ĉar ĝi povas montri la egan distancon kaj la sennombrajn malsimilaĵojn inter la 1936a kaj la 1978a Hispanio kaj la maleblan ripeton de tio jam okazinta. Oni serĉu aliaĵon, finfine.

Eble ĝi enhavas ankaŭ kritikan intereson. Al mi sendube plaĉus, ke ĝi estu ŝtonfrapo sur la plenfalsa vitroŝranko de la stalinista legendo pri tiu periodo. Post 40 jaroj de frankista cenzuro –kaj de postfrankista malbona konscienco– la hispanaj stalinistoj sukcesis trudi heroan kaj demokratian bildon pri sia agado –reale tute kontraŭrevolucia kaj subpremanta– dum la intercivitana milito. Pluraj libroj denoncis jam tiun mistikigon (la plej bona estas probable *La granda trompo* de B. Bolloten),

a Central Nacionalsindicalista: faŝista unika sindikato dum la diktatorado

tamen ne malutilas daŭrigi la ŝtonĵetadon kontraŭ la vitralo de la mensogo, eble inter ĉiuj ni sukcesos disrompi ĝin.

Tamen mia kritiko ne limiĝas al la analizo pri la tiama stalinismo. Ankaŭ mi kritikas la konduton de la gvidantan sferon de la CNT. Ĝenerale tiuj anarĥiistoj, kiuj kritikis la agojn de la gvidantoj de la CNT (Peirats, V. Richards ktp), ĉiam faris tion el perspektivo *politika*. Ekzemple, eniĝinte en la registarojn, la CNT-aj gvidantoj perfidis la anarĥiistajn principojn; same, konsentinte la militistigon de la milicoj. Ĉio tio estas prava, tamen la afero estas pli grava kaj profunda, kaj tial ŝajnis al mi grava komenci la kritikanalizon pri la burokratiĝo de la CNT "sub la varmo de la povo" tiel ĉe la politika kampo kiel ĉe la ekonomia. Burokratiĝo, kiu, kiel mi kredas esti demontrinta, estis plena kaj ĉioma. Kaj tio gravas ankaŭ por la hodiaŭo. Ĉar kion pretendas tiuj, kiuj restarigas la CNT-n? Ĉu la neeblan ekfunciigon de "revolucia" sindikato, aŭ la organizon de la sindikata burokrataro? La respondo evidentas.

La modernaj socioj kapablas krei senfine kontraŭkorpojn, barilojn kaj miraĝojn, ĉirkaŭ kiuj kuniĝas tiuj, kiuj *pretendas* ŝanĝi aŭ disrompi ilin, en "organizaĵo", kies tasko estas plani la malkonsenton kaj trakti ĝin kun la ŝtato kaj la mastraro per la eterna donu-prenuo, sur kiu baziĝas la konfliktoplena integriĝo de la laboristoj al la produktproceso.

Se ne okazis pli da anarĥiismaj agoj kaj iniciatoj ĉe Hispanio dun la lastaj jaroj, tio estis, ĉar troaj grupoj kaj individuoj limiĝis per la tasko rekonstrui la Palacon de la Mil kaj Unu Noktoj de la anarĥi- sindikatismo, mortinta ekde la majo de la 1937a (se oni deziras mortodaton, kio ankaŭ ne nepras). Dediĉinte tutan sian tempon kaj streĉon al tiu iluzia tasko, ili ne sciis nek povis havi la plej minimuman novan ideon. Tiu Palaco, kiu multe similas *ankoraŭ* Babeloturon, havas neniun memkongruon krom situiĝi en la pasinto.

La registaro de Lia Reĝa Moŝto devas ne forgesi la CNT-n je la horo koncedi subvenciojn al la sindikatoj (eble ĝi atingos ion ĉe la disdono de la akiraĵoj de la CNS), ĉar, kio estus okazinta, se ĉiuj, kiuj hodiaŭ klopodas la kostruon de la palaco de la nura nostalgio, estus pensantaj kaj agantaj tie ĉi kaj nun?

C. Semprún-Maura
Parizo, je novembro de la 1977a

Atentigo de la tradukinto

***a) pri la verko**. Tiu ĉi traduko ne havas permeson de la verkinto, fakte mi eĉ ne scias, ĉu li ankoraŭ vivas. Tamen mi mirigus, se homo verkinta tian verkon, pledus pri kopirajto.*

***b) pri la traduko**. Mi ne estas tradukisto. Tamen, kiel ĉiu scias, la bonaj tradukantoj kaj bone regantaj la esperanton kutimas ne atenti pri tiaj verkoj. Tial mi kuraĝas proponi mian mallertan esperantigaĵon.*

***c) pri la piednotoj**. Tiuj numeritaj estas piednotoj de la verkinto, tiuj "literigitajn" de la esperantiginto. Mi klopodis montri la prononcon de la pluraj hispanaj nomoj kaj vortoj aperantaj tra la verko. Tamen estas hispana sono, tiu signita de 'c' antaŭ 'e' aŭ 'i' kaj de 'z' antaŭ 'a', 'o' aŭ 'u', al kiu respondas neniu esperanta sono. Tiuokaze mi ne donis pronuncadon. Oni imagu, ke temas pri angla 'th' en vortoj kiel "thank" aŭ "thought".*

***d) pri la mallongigoj**. Estis uzataj*

- *sl = samloke = ibid. = ibidem*
- *c.v. = citita verko = op. cit. = opus citatum*
- *pĝ = paĝo(j)*

***e) pri la esperantigo de historiaj nomoj**. La personnomoj ne estas esperantigitaj, kvankam ties prononcado estas montrita piednote. La nomo de la plejmulto de la partiaj kaj instituciaj nomoj estas esperantigitaj kaj ties hispana resp. kataluna formo montrita piednote, tamen la plejmujto el la komencliteroj ne estas esperantigitaj. Mi kredas, ke tiu procedo favoras la nehispanajn legantojn, kiuj tiel povos rekoni la rolulojn, se li legas alia(j)n libro(j)n pri la afero. Nome mi ne esperantigis: Generalitat [Ĵanaralitat'], kataluna aŭtonomeca registaro; Esquerra (Republicana de Catalunya) [Askera], kiu, esperantigita kiel Maldekstro, povus kaŭzi konfuzon; Rabassaires [Rabasajras], por kiu mi ne konas esperantan ekvivalenton.*

e) pri la esperantigo de katalunaj urbonomoj.

Girona [Ĵirona]	estas esperantigita kiel	*Ĵirono*
Lleida [Ljejda]		*Ljejdo*
Tarragona [Tarragona]		*Taragono*
Barcelona [Barsalona]		*Barcelono*

Kiel videble, tiuj nomoj estis esperantigitaj laŭ sialanda prononco, escepte de Barcelono, kiu sekvas la kutimon. Eble iuj legantoj konis Ĵironon kaj Ljejdon per ties hispanaj nomoj, resp. Gerona [Ĥerona] kaj Lérida.

Ĉapitro 1a
La militista ribelo kaj la revolucia reago

La militista ribelo

En Melilla[a] je la kvina posttagmeze de la 17a de julio de la 1936a la konĵurintaj oficiroj ekagis: ili eksigis la respublikanan oficiron komandantan la garnizonon, okupis la publikajn konstruaĵojn kaj proklamis la sieĝan staton. La militista ribelo kontraŭ la hispana respubliko ekmarŝis. La aliaj garnizonoj (Tetuán, Ceuta, Larache[b] ktp) sekvis ilin dumnokte, kaj la sekvantan tagon matene la tuta "hispana" Maroko kuŝis ĉemane de la ribelaj militistoj. La rezistklopodoj de la "fidelaj" militistoj kaj de la laboristaj sindikatoj estis rapide sufokataj.

La generalo Franco[c], kiu flugveturis el sia garnizono ĉe la Kanariaj Insuloj al Tetuano, alparolis perradie tiujn, kiuj "konservas la sanktan amon al Hispanio":

> *"Estas tuta Hispanio, kiu stariĝas postulante pacon, fratecon kaj justecon; ĉe la tuta lando la militistaro, la armea ŝiparo kaj la fortoj de publika ordo stariĝas por defendi la patrujon.*
>
> *La energio, kiun ili uzos por la subtenado de la ordo, estos proporcia al tiu de la rezisto, per kiu oni kontraŭstarus ilin."*[1]

La respublika registaro, tre malpli energioplena, kontentiĝis per la dissendo la 18an matene de komunikaĵo sengraviganta la ribelon kaj asertanta, ke la ribelo estis limigata al Maroko, kaj ke "*neniu, absolute neniu ĉe la duoninsulo aliĝis al tiu absurda entrepreno.*"[2] Dume la duoninsulaj garnizonoj, sekvante la ekzemplon de tiuj de la "hispana" Maroko kaj Kanario, ribelis sukcesoplene ĉe pluraj regionoj: Navarra (Pamplona), Aragono (Zaragoza), Malnova Kastilio (Burgos, Valladolid), Andaluzio (Sevilla) ktp.

Kiam la respublika registaro estis devigata rekoni, ke Sevilla falis ĉemanen de la generalo Queipo de Llano[d], la sociista kaj komunista partioj aperigis kune la sekvantan komunikaĵon:

> "La momento estas malfacila sed ne senesperiga. La registaro certas havi ĉemane sufiĉajn rimedojn por sufoki tiun kriman provon. Okaze ke tiu ĉi rimedoj estus nesufiĉaj, la Respubliko havas la solenan promeson de la Popola Fronto. Tiu ĉi estas decidita partopreni la lukton, ĵus kiam ĝi estu alvokita pri helpo. La registaro ordonas, kaj la Popola Fronto obeas."[3]

---

a Pron.: Melilja

b Pron.: Laraĉe

c Pron.: Franko

1 ABC, Andaluzia eldono, 23a de julio de la 1936a

2 Claridad, Madrido, 18a de julio de la 1936a

d Pron.: Kejpo de Ljano

3 PEIRATS, J.: *La CNT en la revolución española* [La Nacia Konfederacio de la Laboro ĉe la hispana revolucio]. Parizo: Ruedo Ibérico 1971a, vol. 1a, pĝ. 139a.

Tamen la registaro hezitis. Ŝajnas kvazaŭ ĝi esperus, ke parto de la militistaro sin tenu fidela, parto sufiĉa por rezignigi la "malsubmetitajn" daŭrigi ties "absurdan entreprenon". Samtempe ĝi rifuzis "armi la popolon" memkompreneble timante la revolucion, sed timante sendube ankaŭ, ke tiuj hipoteze fidelaj, aŭ almenaŭ hezitaj, militistoj turniĝu al la malamika kampo. Per tiu ĉi malantaŭeniro la aranĝoj, kiujn ĝi decidis la 18an de julio, aperas perfekte ridindaj, ĉar ĝi kontentiĝis per la eksigado de la ribelintaj militistestroj, kaj je la tria kaj kvarono posttagmeze ĝi aperigis novan deklaracion:

> *"La registaro alprenas denove la parolon por konfirmi la absolutan trankvilecon de la situacio ĉe la tuta duoninsulo. La registaro dankante la ricevitajn subtenoferojn deklaras, ke la plej utila subteno, kiun oni povas doni al ĝi, estas garantii la normalecon de la ĉiutaga vivo, cele doni ekzemplon pri la alta sereno kaj konfido je la rimedoj de la Povo."*[4]

Sed kiaj rimedoj estis tiuj krom la militistaro kaj la polico, kiuj estis preskaŭ plene pro la ribelantoj? La respublika registaro, kiu timis la revolucion, daŭrigis esperante, revante, ke la militistaro, aŭ grava parto el ĝi, "retrovu la bonsencon". Tial, ke ĝi esperis tiun miraklon, ĝi rifuzis doni armilojn al la laboristaj organizaĵoj. Ankoraŭ plu, la ĉefa ministro kaj ministro pri la milito Casares Quiroga[a]. proklamis, ke kiu ajn disdoninta armilojn sen lia permeso estos mortpafita.

La prezidento de la Respubliko, Manuel Azaña, klopodante ĉiurimede eviti la alfronton, anstataŭigis la registaron Casares Quiroga per alia prezidita de Martínez Barrio *taskita trakti* kun la ribelintaj militistoj. Martínez Barrio, por estigi registaron de "nacia unuiĝo", oferis la ministerion pri la milito al la generalo Mola, kiu estis la estro de la ribelo ĉe la norda landparto. La ĉefministro kontaktis lin pertelefone. Sed memkompreneble Mola rifuzis. Ĉiele estis tro malfrue, la sorto jam estis neŝanĝebla. Al la registaro Martínez Barrio restis nursole demisii kaj demisiis. Ĝi daŭris nur iuj horoj, sed dum tiuj horoj la ribelo disvastiĝis tra la tuta duoninsulo, kaj la premo de la laboristaj amasoj, por akiri armilojn kaj komenci la lukton, plifortiĝis momenton post momento. Ĉe iuj regionoj la laboristoj komencis sin armi proprarimede. Tial, kiam la 19an de julio formiĝis nova registaro, prezidita de José Giral[b], tiu devis akcepti la disdonadon de armiloj al la laboristaj organizaĵoj. Kontraŭe ĝi estus forbalaita de la militistoj, sed, armante la laboristajn organizaĵojn, ĝi fordonis al ili ne nur armilojn sed ankaŭ la realan povon.

La pretigado por la lukto en Barcelono

La Militista Kunveno[c] de Barcelono, kiu formiĝis antaŭ pluraj monatoj, estis ellaborinta kune kun la Centra Stabo de la "bandanoj" planon perfektan sur la papero. Temis pri la efektivigo de la tasko, kiun generalo Mola en sia ĝenerala plano pri la

---

4 *Claridad*, Madrido la 18an de julio de la 1936a

a Pron.: Kasares Kiroga

b Pron.: Ĥose' Ĥiral'

c Hispane: Junta Militar. Pron.: Ĥunta Militar'. Neleĝa oficira reakcia asocio.

ribelo difinis tiel: "sendanĝerigi la katalunajn proletajn amasojn"[5]. Tiucele la trupoj devis kunflui el la antaŭurbo al la urbocentro kaj okupi la ĉefajn administrejojn. La Mola plano antaŭvidis "sciigi la trupon pri tio, ke oni pretigas movadon kontraŭ la Respubliko, kaj ke la armeo, kiel garantianto de la ordo, devas surstratiĝi por defendi la Respublikon". Tiu ĉi milita ruzo montras okulfrape, ke la konspirantaj oficiroj ne tro fidis je siaj trupoj. Rilate al la oficiroj konataj per siaj prorespublikaj ideoj, tiuj devis esti neutraligitaj ekde la komenco. Ĉar tiuj ne estis multenombraj, tiu planparto ne trovis troajn malfacilaĵojn.

La militistoj esperis, ke oni ne kontraŭstaris ilin per grava rezisto. Iu el ili deklaris malmultajn tagojn antaŭ la ribelo: "Kiam tiu tuta kanajlaro aŭdos tondri la kanono, ĝi forkuros kiel leporaro."[6] Tio tamen estis, kio ne okazis.

Lluís Companys[a], prezidento de la *Generalitat*[b], ŝajnas esti estinta iom pli konscia pri la "puĉista" danĝero ol siaj kolegoj de la centra registaro. Ĉiuokaze la 16an de julio matene deziris intervidiĝi kun la reprezentantoj de la CNT[c], la povoplena sindikato anarĥi-sindikatista. La celo de tiu ĉi intervidiĝo estis pristudi kunece la rimedojn por kontraŭstari la faŝistan danĝeron.

> *"Por pristudi tiun peton la regionaj komitatoj de la CNT kaj de la FAI[d] kunvenis kun pluraj gravaj anoj de ambaŭ organizaĵoj. La decido, kiun oni adoptis, estis tio, ke 'antaŭ la faŝista minaco la CNT kaj la FAI, forgesante ĉiujn ofendojn kaj neplenumitajn kontoalĝustigojn, asertas, ke estas nepre, aŭ almenaŭ dezirinde, estigi intiman kunlaboron de ĉiuj la liberalaj, progresemaj kaj proletaj fortoj, kiuj estas pretaj alfronti la malamikon'. Tiam la laboristaj anarĥiistaj organizaĵoj de Barcelono estigis Komitato de Kunligo kun la Generalitat, konsistigita de kvin anoj de la du organizaĵoj: Santillán, García Oliver, Francisco Ascaso[e] de la FAI kaj Durruti kaj Asens de la CNT."*[7]

La plej efika aranĝo, kiun povus esti adoptinta tiu Komitato de Kunligo, estus la armildisdono al la laboristoj kaj la konkreta organizo de la kontraŭstaro al la ribelo. Tamen la *Generalitat* ne povis fari tion, ĉar tiel ĉe Barcelono kiel ĉe Madrido, "se la politikistoj timas la faŝismon, ili timas ankoraŭ pli la armitan popolon", kiel skribis la anarĥiisto Diego Abad de Santillán. Tiel do la *Generalitat* ne nur ne konsentis doni al la Kunliga Komitato la malmulton, kiun tiu ĉi petis –t.e. mil pafilojn!–, sed krome la CNT-anoj, kiuj gvatis la kazernojn, estis arestataj kaj senarmigataj de la polico. Tiusence tuta la agado de la Kunliga Komitato estis trakti, ke ne estu konfiskitaj la malmultaj armiloj, kiujn la anarĥiistoj sukcesis kaŝi dum la ŝtatrevenĝo post oktobro de la 1934a[8] .

---

5 *Solidaridad Obrera*, Barcelono la 18an de julio de la 1936a

6 PAZ, Abel: Paradigma de una revolución. Parizo: Editions de l'AIT 1967a, pĝ. 26a

a Pron.: Ljuis' Kumpanjs'

b Pron.: Ĵanaralitat'. Kataluna registaro.

c Nacia Laborista Konfederacio

d Iberia Anarĥiista Federacio

e Pron.: Askaso

7 ABAD DE SANTILLAN, Diego: *La revolución y la guerra de España* [La revolucio kaj la milito de Hispanio]. Havano: El Libro 1938, pĝ 131a

8 Pri la oktobraj okazintaĵoj oni vidu la aneksaĵon 1an

La 17an de julio, kiam jam estis konata la ribelo de Maroko, la FAI disdonis manifeston ĉe la fabrikelirejoj:

> *En tiu ĉi momento la faŝista danĝero jam ne estas minaco, sed sangosoifa realaĵo... Tiu ĉi jam ne estas momento por heziti. Estas efektivigendaj niaj decidoj. En ĉiu urbo la anarĥiistaj grupoj kaj la Liberecanaj Junularoj agu en intima kontakto kun la respondecaj organoj de la CNT. Ni evitu la konflikton kun la fortoj kontraŭfaŝismaj, kiuj ajn ili estu, ĉar la nepra celo de la momento estas neniigi la militistan, klerikan kaj aristokratan faŝismon. Ne perdu la kontakton, kiu devas esti seninterrompa, kun la specifa organizaĵo*[a] *regiona kaj nacia. Ekvivu la revolucio! Mortu la faŝismo!"*[9]

Dumnokte la laboristoj kuniĝis ĉe la sindikatejoj. Verdire tie pasis ili tutan sian liberan tempon ekde la 12a de julio, ĉar ili sciis, kiel ĉiuj en Hispanio –ekscepte de la centra registaro, kiu *ne volis scii*–, ke la militistoj kaj la faŝistoj preparas ŝtatrenverson. Tiun saman 12an de julio la aktivuloj de CNT kaj FAI decidis sendi armitajn grupojn por gvati la kazernojn, por ke la armeo ne agu neatendite, kaj por ke ili povu antaŭzorgi pri la pluraj kuniĝpunktoj, kiujn oni uzos, kiam komenciĝos la lukto. Ekde tiu ĉi momento oni atendos. Sed la novaĵo pri la ribelo de Maroko klare komprenigis ĉiujn, ke la alfronto estos tuja. La maltrankvileco kreskis: nepris trovi armilojn ĉiurimede. Maristo, Juan Yagüe[b], proponis forpreni la armilojn, kiuj kuŝas ĉe la salonoj por oficiroj de la ŝarĝoŝipoj, kiuj ankradis ĉe la haveno. Grupo efektivigis la proponon: tiurimede oni kolektis 150 pafilojn kaj dekduon da pistoloj. Sed la policestro Escofet[c] sendis taĉmenton de Sturmaj Gvardianoj[d] al la Sindikato de Transportado, kie la CNT-anoj disdividis la akiraĵon. La gvardianoj ĉirkaŭis la sindikatejon kaj la okazaĵo estus finiĝonta per aŭtentika batalo, se Durruti kaj García Oliver ne estus aperintaj; tiuj traktis interkonsenton: oni fordonos dekduon da pafiloj al la Sturma Gvardio kiel simbolan sukceson de ties komisiono[10]. (Rimarkindas, ke la Sturma Gvardio, kontraŭe al la Civila Gvardio, estis policokorpuso kreita de la Respubliko, kaj ke multaj el ĝiaj anoj estis respublikanoj kaj eĉ sociistoj).

Post tiu ĉi plia atenda kaj pretiga nokto daŭris la mobilizo en la sindikatejoj dum la tuta 18a tago. La CNT-anoj sin organizis laŭ kvartaloj per Revoluciaj Komitatoj. Tiuj ĉi komitatoj estis ludontaj esencan rolon en la revolucia procezo kaj ekde tiu ĉi momento prizorgis la pretigadon de la bataloj. Kunligaj agentoj informadis ilin pri la situacio ĉe la kazernoj, t.e. pri la pliiĝanta maltrankvileco de la oficiroj antaŭ la alproksimiĝo de la horo H. Tiunokte la radio dissendis mesaĝon de la Nacia Komitato de la CNT, kiu alvokis al la ĝenerala striko kaj rekomendis ĉiujn komitatojn kaj aktivulojn resti interkontakte kaj atente en la sindikatejoj kun la armiloj ĉemane. Tuje la Kataluna Regiona Komitato de la CNT sekvis la luktvorton.

---

a La FAI

9 ABAD DE SANTILLAN, Diego: *Por qué perdimos la guerra* [Kial ni malvenkis la militon]. Madrido: G. del Toro 1975a

b Pron.: Ĥuan' Jagŭe

c Pron.: Askufet'

d Hispane: Guardia de Asalto (respublikana polico)

10 KAMINSKI, E.H.: *Ceux de Barcelone* [Tiuj de Barcelono]. Parizo: Denoël 1937a, pĝ 21a

Je la 9a vespere de tiu 18a de julio okazis lasta intervidiĝo inter la CNT-FAIa Kunliga Komitato kaj Companys. Tiu ĉi tenis la rifuzon disdoni armilojn. Tiu sinteno ŝajnis malkonsekvenca: la 16an de julio li mem petis al la CNT kaj FAI kunlaboron por la defendo de la Respubliko, kaj poste li neis senĉese, eĉ kiam la puĉo jam estis komencita, la rimedojn por garantii tiun defendon: la armilojn. Kvankam Companys –kontraŭe al la centra registaro, kiu ankoraŭ revis esti la sola povo kaj la unika aŭtoritato laŭleĝa, ĉar ne reala–, apudiĝis la ĉefan forton, kiu taŭgis ĉe Katalunio bari la pason al la faŝismo –la CNT–, li ne kuraĝis armi la anarĥiistajn amasojn. Kiel li armus tiun ularon, kiu kuraĝus fari "kiun ajn frenezaĵon" –eĉ la socian revolucion? Tamen ne armi ilin ĉu ne signifus lasi senbarilan vojon al la faŝismo? Antaŭ tiu ĉi dilemo Lluís Companys, gvidanto de la aŭtonomeca kataluna movado, respublikano kaj liberalulo, povis neniun alian krom heziti.

Kiam ili sciis pri tiu nova rifuzo, la CNTaj aktivuloj, kiuj esperis ĝis la lasta momento sintenoŝanĝon de la *Generalitat*, findecidis akiri armilojn per kiu ajn ebla rimedo: ili forrabis armejojn, ŝtelis dinamiton ĉe la ŝtonminejoj kaj helpitaj de iuj sturmaj gvardianoj proprigis iujn fuzilajn rezervojn de la registaro. Ili rekviziciis partikularajn aŭtomobilojn por plifaciligi la rapidan kontakton inter la pluraj grupoj. Tuj kiam oni surskribis la komencliterojn 'CNT-FAI' sur la aŭtomobilŝeloj, la veturiloj komencis trakuri la Barcelonajn stratojn. La grupo de armitaj aktivuloj gvatantaj la kazernojn vidadis eniri falangistoj kaj *requetés*[a], kiuj tie ricevis uniformojn kaj armilojn, por batali kune kun la militistoj. Finiĝis la nokto, plia atenda nokto.

Oni rajtas demandi, kial la laboristaj organizaĵoj, ĉefe la CNT, kiu estis ĉiuflanke la plej grava el ĉiuj en Katalunio, ne atakis la unuaj profitante la surprizaventaĝon. La nursola klarigon, kiun mi trovas, estas la nesufiĉeco de armiloj kaj la espero pri sintenoŝanĝo flanke de la *Generalitat*. Sendube tamen la timo disrompi la kontraŭfaŝisman fronton per ago, kiun la *Generalitat* ne povus nek volus apogi, pezis ankaŭ grave. Ĉiuokaze tiu "atendopolitiko", kiu estis ĝenerala flanke de ĉiuj laboristaj organizaĵoj ĉe la tuta duoninsulo, plifaciligis ofte la komencan venkon de la militistoj.

La bataloj de la 19a kaj 20a de julio en Barcelono

La 19an de julio je la kvara kaj duono matene la trupoj eliris el la kazernoj kriante: "Vivu la Respubliko! Vivu Hispanio!", sed la militruzo elpensita de Mola fiaskis. La laboristaj pikedoj, kiuj eĉ dum unu sola momento ne kredis la trompaĵon, kaj kiuj antaŭ tagoj restadis apud la kazernoj, ekpafis tuje. La fabrikfajfilegoj eksonis alvokante la laboristojn al la batalo. La trupoj sekvante la antaŭplanaĵon, t.e. la rapida okupo de la strategiovaloraj urbolokoj, situiĝis ĉe la placoj de Hispanio, de la Universitato kaj de Katalunio, prenis la plej gravajn konstruaĵojn, nome la hotelon

a Falangistoj: anoj de Falange Española [Falanĥe Espanjola], la hispana faŝista partio. Requeté [rekete'] surnomo de la anoj de la Comunión Tradicionalista Española, tradicia monarĥiista partio

Colon, la hotelon Ritz kaj la telefoncentrejon. La trupoj de la kazernoj de Drassanes kaj de Mestransa okupis la urboparton de la haveno el la poŝtcentrejo ĝis la strato de la Paralelo. La generalo Goded, kiu alvenis flugmaŝine el Maljorko por komandi la ribelon, instaliĝis en la Generala Kapitanejo kaj eksigis kaj arestis la garnizonestron, Llano de la Encomienda[a], fidelan al la Respubliko.

Tia estis la situacio dum la fruaj matenaj horoj. Tamen la militistoj trovis ĉie feran kontraŭstaron. En la Breĉo de Sankta Paŭlo apud la Lignolaborista Unika Sindikato la aktivuloj de tiu ĉi sindikato starigis gravan barikadon ĉe la strato de la Paralelo, per kiu ili retenis dum kvar horoj la militistojn, kiuj atingis disrompi la barikadon kaj okupi la sindikatejon nur post devigi marŝi antaŭ si la virinojn kaj la infanojn de la kvartalo. Sed tagmeze kontraŭatako de CNTaj aktivuloj rekonkeris la perditan terenon.

Samtempe okazis ĉe la urbocentro decidontaj bataloj. La militistoj estis sieĝataj en la konstruaĵoj, kiujn ili estis okupintaj ĉe la placo de Katalunio. Frue posttagmeze la laboristaj batalantoj ricevis la apogon de la Sturma Gvardio kaj de iomaj civilaj gvardianoj estritaj de la kolonelo Escobar[b] (iu el la tre malmultaj oficiroj de la Civila Gvardio –la forto faka pri la subpremado de la laborista kaj kamparana movadoj–, kiuj aliĝis al la prorespublikana fronto). La situacio de la militistoj malpliboniĝadis ĝis kriza. Ili povus sin teni nur per la alveno de freŝaj helpofortoj de la Kazernoj de Sankta Andreo kaj de la Kajoj. Sed la laboristoj de Barceloneto[c] fiaskigis la strecon de la helpaj kolumnoj, konsistigitaj de kavaleria kaj artileria regimentoj. Dum la bataloĵoj ĉe la aleo de Ikario apud la kazerno de la Kajoj okazis io, kio findecidis la luktoturniĝon. Tiuokaze la soldatoj pravigis sian econ de "laboristoj kaj kamparanoj uniformitaj", kiel oni povas nomi ilin per la ĵargono de la prolaborista movado: iuj el ili ne sciis kion fari, aliaj pafis kontraŭ la nuboj, aliaj efektivigis la strofojn de la Internacia kaj ekpafis kontraŭ siaj oficiroj. La laboristoj profitis la ŝancon kaj sin direktis amase kaj senprotekte kontraŭ la malamikon. Ili kaptis gravan kvanton da kanonoj. La revolucia kontraŭatako estis komencita.

La batalo daŭris ankaŭ dumnokte, tamen la militistoj superegis jam nenie. La konstruaĵoj, kiujn ili okupis ĉe la urbocentro, estis reakiritaj. Je la fruaj horoj de la lundo la 20a la kanonoj estis vicigataj antaŭ la Generala Kapitanejo. Oni invitis kapitulaci la ribelestrojn. Por finkonvinki ilin salvo skuis la tutan konstruaĵon, dissolvante tiel la lastajn esperojn de la militistoj. Goded estis arestata, kaj iuj CNTanoj portis lin al la *Generalitat*-a Palaco, kie li deklaris antaŭ la radiomikrofonoj:

> *"Tie ĉi la generalo Goded. Mi alparolas la popolon por deklari, ke fortuno kontraŭis min, kaj mi estas kaptita. Tion mi diras, por ke ĉiuj, kiuj ne deziras daŭrigi la lukton, sin sentu liberaj de ĉiu devo kun mi."*[11]

---

a Pron.: Ljano de la Enkomjenda

b Pron.: Eskobar'

c Apudmara kvartalo de Barcelono

11 PAZ, Abel: c.v. pĝ 124a

Ĉe la kazernoj la soldatoj ribelis, mortpafis siajn oficirojn kaj disdonis armilojn al la laboristoj. Nur la fortikaĵo de Drassanes restis ĉemane de la militistoj. La respublika aviado –iomaj "cucos"– komandita de Díaz Sandino komencis la atakon per bombardo. Poste la laboristoj efektivigis la finan atakon, dum kiu mortis Francisco Ascaso, fama anarĥiista aktivulo. Tiel estis neniigita la militista ribelo en Barcelono la 20an de julio. La aktivuloj de la prolaboristaj organizaĵoj alproprigis al si ĉiujn armilojn kuŝantaj ĉe la kazernoj. Per ŝarĝoveturiloj, omnibusoj kaj rekviziciitaj privataj aŭtomobiloj la armitaj pikedoj marŝis al la urboj kaj vilaĝoj de la kataluna provinco kaj subpremis la militistojn ĉe Taragono, Ĵirono kaj Ljejdo.

Kia estis rezulte la situacio ĉe la resto el Hispanio? La militistoj konkeris iujn ĉefajn strategilokojn ĉe Andaluzio (Kadiz, Kordobo, Seviljo), kie surteriĝis la trupoj de la Maroka korpuso transportitaj de italaj flugmaŝinoj. Ili ankaŭ mastris terenon, kiu ampleksis el La Coruña ĝis Huesca kaj Zaragoza, kaj el Cáceres[a] sekvante la portugalan landlimon al Avilo kaj Segovio ĝis Teruel, kaj kiu enhavis Navarra-n, plejparton el Aragono, Malnovan Kastilion, Leonon, preskaŭ tutan Galicon kaj parton el Extremadura[b]. La respublikana kampo do restis disigita duope: Eŭskio, Santander, la norda parto de Asturio (ekscepte de la ĉefurbo, Oviedo), kiuj estis limigitaj unuflanke de la maro kaj alifanke de la "bandanoj"; kaj la plej grava parto konsistigita de preskaŭ tuta Andaluzio, Levante, Katalunio, parto el Extremadura kaj Nova Kastilio. Rimarkindas, ke ĉe la pli industriigitaj (ĉefe Eŭskio kaj Katalunio), iuj el la plej riĉaj kampokulturantaj (kiel Levante) regionoj kaj la ĉefaj urboj, kiel Madrido, Barcelono, Valencio, Bilbao ktp la militista ribelo fiaskis; kaj ke tiu malvenko estis ĉie kaŭzata de la amasa ago, ĉar la plejmulto el la armeo kaj la polico situiĝis pro la "puĉistoj". Tiu ĉi "mapo" krome respondas preskaŭ ekzakte al la influo sur la lando de la dektraj kaj maldektraj fortoj. Tiel la militista ribelo, kiu estis konceptita kiel simpla *pronunciamiento*, kiu estus daŭronta apenaŭ iomajn tagojn, kaj kiu devus trovi malmultan kontraŭstaron, stumblis per malfacilaĵserio ne antaŭvidita de la staboj. Kvankam por la grankapitalistoj kaj la mastroj terohavantaj –kaj por la tuta kohorto da militistoj, klerikoj, monarĥiistoj, falangistoj kaj aliaj partianoj de la dikredo, la ordo kaj la patrio– la puĉo devus esti antaŭzorga aranĝo kontraŭ la alproksimiĝanta socia revolucio, reale ĝi faris ĉie nenion pli krom provoki ties eksplodon. Dum la unuaj monatoj de la civila milito okazis ĉe Hispanio senantaŭaĵa socia revolucio. La faŝismo estis detenata, la burĝa Respubliko trafita de la revolucia tajdo dispeciĝis. Plian fojon en la nuntempa historio la ekspluatataj amasoj ŝajnis mastri sian destinon.

La povo de la armitaj laboristoj[12]

La konstruaĵo de la burĝa ŝtato disfalis ĉe la tuta lando: "De la ŝtato restas nenio plu krom la polvo, la cindroj" skribis poste respublikana juristo[13]. Ĉe la kampo

a Pron.: Korunja, Ŭeska kaj proksimume Kazeres

b Pron.: Ekstremadura

12 Pri la laboristoj, proletaro kaj "laborista movado" oni vidu la precizaĵojn de la 2a aneksaĵo

13 OSSORIO Y GALLARDO: Vida y sacrificio de Companys [Vivo kaj mortofero de Companys] pĝ

superregita de la militistoj eksonis la horo por ĝeneraligita kontraŭrevolucia perforto. Ili mortpafis ne nur la aktivulojn de la laboristaj organizaĵoj, sed ankaŭ la laboristojn kaŭze nure de esti laboristoj. Ili mortpafis ne nur la voĉdonintojn pro la Popola Fronto, sed ankaŭ ties edzinojn, ties gepatrojn, ties gefilojn.

Ĉe la "respublika kampo" la registaro havis nenian realan aŭtoritaton. Kiel diris la komunista gvidantino Dolores Ibarruri: "Tuta la ŝtataparato estis neniigita, kaj la ŝtatpovo pasis al la strato"[14]. Dolores Ibarruri (kiel la aliaj HKP-gvidantoj) bedaŭris tiun situacion; aliflanke la komunistoj ne malfruis sin dediĉi al la restarigado de la ŝtatpovo.

> *"Senigita de la subpremantaj ŝtataj organoj la registaro de José Giral posedis la noman povon, sed ne la efektivan, ĉar tiu ĉi estis disigita en sennumeraj fragmentoj kaj disĵetita tra miloj da urboj kaj vilaĝoj inter la revoluciaj komitatoj, kiuj estigis sian regadon sur la poŝto- kaj telegrafoservo, radiostacioj kaj telefoncentrejoj; kiuj organizis policoskadronojn kaj tribunalojn, landvojan kaj landlimajn patrolojn, transportad- kaj provizumservon; kaj kiuj formis milicounuojn por la batalfrontoj. Resume la ministraro de José Giral havis realan aŭtoritaton nenie en Hispanio."*[15]

Kvankam tiu situacio ĝeneraliĝis ĉe la tuta respublikana kampo, estis ĉe Katalunio, kie tiu fenomeno atingis plejan amplekson. Tio pravas ne nur rilate al la politikaj, militaj kaj subpremaj povoj, sed ankaŭ koncerne al la interhome sociaj kaj ekonomiaj rilatoj. Ĉio estis ŝanĝita, trenita, aliigita de la granda revolucia tajdo, kiun senkatenigis plej kontraŭvole la militista ribelo.

Ĉe Barcelono la armitaj laboristoj mastris la urbon kaj aliigis tuje ties aspekton: ili bruligis la preĝejojn (escepte de la katedralo, taksita kiel "artoverko") aŭ transformis ilin al lernejoj, kunvenejoj, merkatoj ktp. Estiĝis novaj revoluciaj tribunaloj kaj malaperis la malnovaj; kutime la plej reakciaj juĝistoj estis ekzekutataj, la prijuĝaj arkivoj estis bruligataj, la malliberulejaj pordoj estis malfermataj ne nur por la pripolitikaj malliberuloj sed ankaŭ por tiuj de la komuna juro. La laboristaj organizaĵoj kreis la Komitatoj pri Provizumo, kiuj anstataŭis preskaŭ ĉie la privatan komercon[16]. Aliaj komitatoj –ĉefe la Komitato pri la Nova Uniĝinta Lernejo, konsistigita de aktivuloj de la laboristaj kaj universitatanaj organizaĵoj– sin okupis pri la instruado, estiginte en malmultaj tagoj 102 novajn lernejojn. La Prikontrolaj Patroloj gardis stratojn kaj landvojojn. La landlimaj postenoj apud Francio, norde de Katalunio, ankaŭ estis gardataj de laboristoj: "...iuj anoj de la Kontraŭfaŝismaj Milicoj deĵoras. Ili surhavas blavan laborveston, sur kiu elstaras la kartoĉujoj. Ili estas armitaj ĝis la dentoj per pistoloj kaj fusiloj. Post granda tablo sidas laboristoj kun la pistolo ĉezone, kiuj kontrolas pasportojn kaj kreditkartojn"[17]. Kaj ĉefe la laboristaj milicoj taskiĝis pri la lukto kontraŭ la militistoj: kvar tagoj post la fino de la

14 IBARRURI, Dolores: *Speeches and Articles (1936-1938).* [Paroladoj kaj artikoloj (1936-1938)] Propaganda broŝuro de la HKP.

15 BOLLOTEN, Burnett: El gran engaño [La granda trompo]. Barcelono: Caralt 1975, pĝ 43-44a

16 Pri tiuj aferoj –provizumo kaj lernejoj– oni vidu la 3an aneksaĵon.

17 STERLING, M. en Modern Monthly (oktobro de la 1936), citita de BOLLOTEN c.v. pĝ 39a.

Barcelonaj bataloj kolumno da armitaj laboristoj gvidataj de Durruti marŝis por liberigi Zaragozon. Ĝi marŝis sur Aragono kaj aplikis metodon elpensita de la itala anarĥiisto Malatesta: "Okupi urbon aŭ vilaĝon, senpovigi ĉiujn reprezentantojn de la ŝtato kaj inviti la loĝantaron sin memorganizi libere"[18]. Mi ne intencas eĉ plej minimume liveri idilian vizion; la tasko estis plenumata ne sen konfliktoj kaj eraroj, aŭ eĉ sen krimoj, tamen ĝi *estis plenumata*.

La katalunaj laboristoj komprenis baldaŭ, ke la lukto disvolviĝis ĉe du frontoj. Ke la dispecigita ŝtato (tiel la centra registaro, kiel la kataluna relative aŭtonomeca) batalis, unue kaŝite, por ke sia nurŝajna povo fariĝu reala. Ŝajnas, ke ili komprenis rapide, ankaŭ ke ne ĉiuj la fortoj, kiuj kontraŭstaras la radikalan socitransformon jam komencita de ili, estis ĉe la alia kampo. Aliflanke ekde la unuaj tagoj eksplodis konfliktoj inter la povo "malklara, mallumega, nepalpebla, sen precizaj funkcioj nek neta aŭtoritato" de la Komitatoj, laŭ la komunisto Jesús Hernández[a19], kaj la *Generalitat*. Ekzemple la interokazaĵo ĉe Figueres[b], kie anarĥiistaj laboristoj post venki la militistojn estis senarmigataj de la Civila Gvardio. La numero de *Solidaridad Obrera*[c] de la 21a de julio, kiu priskribis la okazintaĵojn, finiĝis per la averto: Kamaradoj, ne lasu senarmigi vin de neniu sub nenia preteksto[20]. Sed la revolucia ondo estis jam tro forta, kaj tiuj, kiuj volis deteni, kanaligi, aŭ eĉ disrompi ĝin, estis devigataj konsenti cedojn. La malnovaj policaj korpusoj estis dissolvataj: tiuj el ties anoj, kiuj luktis kune kun la popolo, aliĝis al la milicoj kaj adaptis la laborveston, kiu anstataŭis la uniformon.

La katalunaj laboristoj, kiuj strikis ekde la 18a de julio, komencis ekde tiu ĉi momento tion, kion Marx nomis "la senproprigo de la senproprigantoj". Ili komencis proprigi al si kaj memregi la plejmulton de la industriaj, priservaj kaj komercaj entreprenoj el Katalunio. Rimarkindas, ke la amasoj faris tion spontanee, sen ordono nek agadvorto de nenia organizaĵo, eĉ de la CNT. Tiu ĉi dum la unuaj tagoj sekvantaj la ribelo pligravigis absolute la lukton kontraŭ la militistoj, kaj tiurilate ĝi estis plene preterpasita de siaj aktivuloj kaj de la amasoj je ĝeneralo. La unua manifesto de la FAI dissendita perradie la 26an de julio parolis pri la "faŝista hidro", sed eĉ unu solan vorton pri la socia revolucio, kiu estis disvolviĝanta. La 28an la Loka Federacio de Sindikatoj de la CNT donis la ordonon reiri la laboron pro la militaj bezonoj, sed ĝi donis eĉ la plej minimuman revolucian agadvorton. Tamen la laboristoj ne kontentiĝis per la "reiro al la laboro", t.e. per la resubiĝo al la ordonoj de siaj mastroj. Ekde la 21a de julio, t.e. la tago sekvanta la venkon super la militistoj, la ĵurnaloj pleniĝis per rakontoj malkovrantaj la novan "animostaton" de la laboristoj; ĉie armitaj grupoj de laboristoj komencis la konfiskojn. Surhavante la blavan laborveston, ruĝan aŭ ruĝan kaj nigran koltukon, ĉekape ĉapon aŭ bereton, armitaj per tre malsimilaj

18 Citita de BROUE kaj TEMINE: La révolution et la guerre d'Espagne [La revolucio kaj la milito de Hispanio]. Editions de Minuit pĝ 43a

a Pron.: Ĥesus' Ernandez

19 HERNANDEZ, JESUS: Negro y rojo [Nigro kaj ruĝo]. Propaganda broŝuro de la HKP. Pĝ 37a.

b Pron.: Figeras

c *Laborista Solidareco*, ĵurnalo de la CNT

20 *Solidaridad Obrera* de la 20a de julio de la 1936a

armiloj, inter kiuj elstaris la Maŭsera fusilo, kaj elmontrante ioman montriĝemon kaj spektaklplezuron, ili ja estis la armita popolo ĉeage. Aro da laboristoj "sin prezentis ĉe la administrejo de la Barcelona Tramvoja Kompanio, konfiskis ĝin kaj la prisocian arĥivon pri la tramvojistoj, kiun la kompanio posedis, kaj bruligis ĝin surstrate."[21] Ĉiuj servoj kaj komunik- kaj transportrimedoj estis konfiskataj ĉitiele de la katalunaj laboristoj. Ekde la 21a la fervojistoj propigis al si la fervojon. Ili konstituiĝis en Revoluciaj Komitatoj kaj organizis la defendon de la stacioj per la fervojistoj mem armitaj de fusiloj kaj maŝinpafiloj. La konfiskmovado agis sur ĉiuj la katalunaj industrifakoj: ĉe Katalunio estis konfiskataj la 70% de la entreprenoj[22].

Memkompreneble tiu ĉi martremo influis sur ĉiuj la la vivoflankoj. Ĝi estis la "granda revolucia festo", per kiu ĉiu ajn ligilo rompiĝis momente. Estas signifoplena, ke la politikistoj kaj la ideologiistoj parolas nenion pri la ĝojo, kiu dum tiuj tagoj mastris la virojn kaj virinojn ĉe la revolucia Katalunio. Tamen tiu feliĉo, tiu freneza ĝojo (freneza, ankaŭ, ĉar la faŝista danĝero estis terure ĉeestanta kaj la kadavroj estis apenaŭ ĵusenterigitaj) atentigis fortike iujn atestantojn. Alveninte Barcelonon, F. Borkenau rakontis:

> *"Tiam, kiam mi turnis la stratangulon de Las Ramblas (ĉefa strato de Barcelono), aperis grandega surprizo: kiel fulmo disfaldiĝis la revolucio antaŭ niaj okuloj. Ĝi estis frapanta. Kvazaŭ ni estus alvenintaj al kontinento malsimilanta ĉiujn ajn, kiujn ni estus vidintaj ĝis tiam."*[23]

> *"En ĉiuj domoj, apud ĉiuj muroj, sur ĉiuj vestoj, sur ĉiuj aŭtomobiloj, en la trajnovagonoj, ĉie estas skribaĵoj kaj desegnaĵoj, kiuj simbolas la lukton kontraŭ la faŝismo kaj la volon de la revolucio. Foje ili estis aŭtentikaj pentraĵoj: laŭŝajne ĉefe la fervojistoj havas rimarkindan pentremon."*[24]

Sendube la fakto, ke la fervojistoj senbridigis sian "pentremon", ankaŭ estis signo pri la transformoj, kiuj estis okazantaj. Borkenau, kies politikaj opinioj estas "moderaj", sed kiu rakontas honeste tion, kion li *vidas*, substrekas: "En tiu ĉi etoso de ĝenerala entuziasmo oni povas paroli senprobleme kun iuj ajn. (...), kaj ĉiuj post nur minuto estas amikoj de ĉiuj."[25] Jes efektive tio estas, kion mi diris, la bariloj rompiĝis, la ŝtato dispeciĝis, la polico dissolviĝis, la mastroj forkuris, la fabrikoj apartenis al la laboristoj. Ĉio eblis! (tio ne daŭros.) Eĉ la situacio de la virinoj, kiuj dum jarcentoj estis katenitaj al la familio, al la edzo, al la kuirejo, al la naskigado, ligitaj per religiaj kaj sociaj tabuoj en iu el la plej severaj mezmaraj tradicioj, ŝajnas, ke aliiĝis tuje: "... la stratoj pleniĝis per ekscititaj grupoj de armitaj junuloj kaj de ne malmultaj virinoj, ankaŭ armitaj; tiuj ĉi kondutis per senĝeno ne kutima inter la hispaninoj, kiam ili aperas publike (antaŭ ol la ribelo estus nekoncepteble por hispanino vestiĝi per pantalono, kiel nun ĉiuj milicaninoj senescepte)"[26]. Oni povas

---

21 PEIRATS: c. v. I, pĝ 164a

22 Oni vidu sube la 4an ĉapitron: La kolektivigado en Katalunio

23 BORKENAU, Frank: The Spanish Cockpit [La hispana luktejo], pĝ 69a

24 sl

25 sl

26 sl

paroli same pri la juneco. Tiu, kiel sciite, estas la ĉefrolulo de la revolucioj. Tamen ĉe Hispanio la familia submetado –malgraŭ la liberecana propagando– estis aparte malmola kaj subpremanta. La gefiloj devis obei siajn patrojn ĝis ties morto. La familia hierarĥio –oni ne forgesu, ke tiam Hispanio estis lando esence kamparana– estis preskaŭ tiel nefleksebla ĉe la "maldekstremaj" laboristoj kiel ĉe la katolikaj reakciaj familioj. Sed surstrate, ĉefabrike, ĉefronte la knaboj (iuj ankoraŭ neaĝantaj 16 jarojn) kaj la knabinoj, pugnotenante la fusilon, ĝoje liberiĝis el la multjarcentaj tradicioj kaj el la "senviva pezo de la estinto sur la cerbo de la vivuloj". Ĉu iu rajtas miri pri tio, ke la amasoj per granda spontanea movo alfrontis samtempe kaj samfortike (kvankam ne ĉiuj estis plenkonsciaj pri tio) ĉiujn subpremadojn kaj ĉiujn hierarĥiajn strukturojn de la socio, arbitre disigitajn kaj apartigitajn per tiuj iluziaj kaj privataj kampoj, kiujn ni nomas tion "politikan", tion "ekonomikan", tion "socian", tion "familian" kaj, kial ne, tion "kulturan"?

George Orwell alvenis Barcelonon je decembro de la 1936a. Per sia bonega libro *Omaĝo al Katalunio* li rakontas la strangan sensacion, kiun produktis al li la urbo. Tamen li sciis (ĉar oni diris tion senĉese al li), ke ekde julio la aferoj tre malpliboniĝis:

> *"La anarĥiistoj ankoraŭ superregis Katalunion, kaj la revolucio troviĝis je sia apogeo. (...) Tiu estis la unua fojo, en kiu mi vizitis urbon regitan de la laborista klaso. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj de ioma graveco estis okupitaj de la laboristoj, kaj la fasadojn kovris ruĝaj standardoj aŭ la ruĝa kaj nigra standardo de la anarĥiistoj; sur ĉiuj la muroj oni vidis la martelon kaj la falĉileton kaj apude la komencajn literojn de la revoluciaj partioj; preskaŭ ĉiuj la preĝejoj estis forrabitaj kaj ties bildoj bruligitaj. Eĉ iuj el la preĝejoj estis sisteme disfaligataj de rotoj da laboristoj. Ĉiuj vendejoj kaj kafejoj montris afiŝon informantan, ke ili estis kolektivigitaj; eĉ la ŝuopurigantoj estis kolektivigitaj, kaj liaj kestoj farbitaj per ruĝo kaj nigro (...). La servutaj aŭ nure respektemaj esprimoj estis malaperintaj momente. Neniu plu diris sinjoro aŭ don eĉ usted; ĉiuj alparolis la aliajn kiel "kamarado" kaj "tú"*[a] *(...). Ne plu estis privataj aŭtomobiloj, ĉiuj estis konfiskitaj, kaj ĉiuj tramveturiloj, taksioj kaj la plejmulto el la aliaj publikaj transportoservoj estis farbitaj per ruĝo kaj nigro (...) Laŭlonge de Las Ramblas, la larĝa centra urboarterio, kie homaj riveroj supren- kaj malsupreniris, laŭtparoliloj tondris la aeron per revoluciaj kantoj dum la tuta tago kaj parto el la nokto. Sed plej surprezinda estis la aspekto de la homoj. Laŭ ĝia ekstero Barcelono estis urbo, en kiu la monohavantaj klasoj ĉesis ekzisti. Ekscepte de eta kvanto da virinoj kaj fremduloj oni ne vidis homojn bone vestitajn. Preskaŭ ĉiuj surhavis vestojn tre simplajn, proprajn de la laborista klaso, aŭ blavan laborveston, aŭ ian variaĵon de la milica uniformo. Ĉio tio rezultis stranga kaj impresanta. (...) Super ĉio oni kredis je la revolucio kaj la estonto, oni havis la sensacion esti enirinta subite en erao de egaleco kaj libereco. La homaj estaĵoj klopodis konduti kiel homaj estaĵoj kaj ne kiel dentradoj de la kapitalista maŝino."*[27]

(Ankaŭ Orwell ne malfruis seniluziiĝi.)

Li ankaŭ rakontis, ke la laboristaj organizaĵoj rekviziciis multajn domojn, kaj oni devas aldoni, ke dum pluraj monatoj (la daŭro dependas de la urbo) neniu pagis la domoluon, efektivigante tiel praktike la senpagecon de la loĝejoj... Oni redonis *sen*

---

a 'Don' kaj 'sinjoro' samsignifas, tamen 'don' –apokopo de 'domine'– estas iom pli respektema. 'Usted' estas simila al la esperanta 'vi' uzata anstataŭ 'ci'. 'Tú' ekvivalentas la esperantan 'ci'.

27 ORWELL, George: *Homenaje a Cataluña*. Barcelono: Ariel 1970. pĝ 40a-42a

kontraŭpago ĉiujn aĵojn de unua neceseco enŝuldigitajn ĉe la pruntejoj, kaj ne estas malfacile imagi tion, kion tio signifis por loĝantaro, kiu estis preskaŭ ĉiam en ekstrema malriĉeco. Oni organizis lukton kontraŭ la mizero kaj la almozpetado, tiel grava en Barcelono antaŭ la revolucio:

> *"La prigasteja sindikato donis manĝaĵojn meztage kaj vespere al ĉiuj malriĉuloj. Por esti admisita nepris –laŭnorme– rajtigilon de komitato aŭ organizaĵo, sed ni ne estas burokratoj!, oni nutris eĉ tiujn, kiuj havis neniun paperon. Tiujn manĝaĵojn oni disdonis ĉe pluraj hoteloj, eĉ en la Ritz.”*[28]

Kiel asertas tre prave Noam Chomsky: "Dum la monatoj sekvantaj la ribelon de Franco disvolviĝis ĉe Hispanio senantaŭaĵa socia revolucio. Obeante spontanean movadon sendependan de ĉiu "revolucia antaŭgvardio", la laboristaj amasoj efektivigis la radikalan transformon de la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj: la entrepreno montriĝis esti grava sukceso –ĝis kiam ĝi estis neniigita per la armiloj."[29]

28 sl

29 CHOMSKY, Noam: L'Amérique et ses nouveaŭ mandarins [Usono kaj ĝiaj novaj mandarenoj]. Editions du Seuil, pĝ 257a.

Ĉapitro 2a
La dispecigita ŝtato

"Ĝi ne estis revolucio kontraŭ specifa formo de ŝtata povo: rajtigista, konstituciista, respublikana aŭ imperia. Ĝi estis revolucio kontraŭ la ŝtato mem, tiu supernatura monstro de la socio; ĝi estis la repreno por la popolo kaj per la popolo de ties propra socia vivo."

Karl Marx: La civila milito en Francio

La Generalitat kaj la povo de la armitaj laboristoj

Katalunio estis la unua regiono, en kie la militistoj estis venkataj, kaj tie estis ankaŭ, kie la "laborista povo" firmiĝis plej fortike. Jaume Miravitlles[a], iu el la gvidantoj de la *Esquerra*[b], la respublikana partio de la katalunnaciista maldekstro, skribis:

> *"La mardon 21an dumnokte la situacio en Barcelono estis reale tragika. La armeo jam ne ekzistis. La organoj de la Generalitat estis tute dissolvitaj en la luktanta popolo."*[30]

Efektive la policofortoj kaj la soldatoj restintaj "lojalaj" eniĝis plene en la laboristaj milicoj. Kvankam la Madrida registaro proklamis, ke la ribelo estis venkita en Barcelono danke la "lojalecon" de la Civilaj Gvardianoj kaj de la Sturmaj Gvardianoj, Companys siaflanke sciis pri kio kalkuli: li gratulis "la fortojn, kiuj kuraĝe, heroe luktis pro la respublikana legaleco kaj pro la civila aŭtoritato", sed li tre bone sciis, ke tio, kion vere faris tiuj ĉi fortoj, tiuj de la kataluna proletaro, estis senigi de ĉiu efektiveco tiun legalecon kaj tiun aŭtoritaton. Tial la 20an de julio, apenaŭ finiĝinta la Barcelona batalo, li alvokis al la *Generalitat* la anarĥiistajn gvidantojn. Juan García Oliver, kiu partoformis la anarĥiistan delegitaron, rakontis la interparoladon:

> *"La prezenta ceremonio estis mallonga. Ni ĉiuj sidiĝis kun la fusilo interkrure. Esence tio, kion Companys diris al ni, estis, kio sekvas: –Antaŭ ĉio mi devas aserti, ke la CNT kaj la FAI neniam estis traktataj tiel, kiel ili meritis laŭ sia reala graveco. Vi ĉiam estis malmole persekutataj, kaj mi, kiu antaŭe estis kun vi*[31]*, poste troviĝis, plejbedaŭre sed trudita de la politikaj realaĵoj, devigata alfronti kaj persekuti vin.*

---

a Pron.: Ĵaŭma Mirabitljas

b Esquerra Republicana de Catalunya (pron.: Askera Rapublikana da Katalunja): Kataluna Respublikana Maldekstro.

30 *Vu* (29a de aŭgusto de la 1936a), citita de PRUDHOMMEAŬ: *La Catalogne Libertaire 1936-1937* [Katalunio liberecana 1936-1937]. Cahiers Spartacus.

31 Lluís Companys defendis kiel advokato mulfoje la anarĥiistojn arestitajn dum la periodo 1917-1923 en Barcelono, kie sinsekvis tiam strikoj, pafadoj kaj atencoj. Poste, kiam, mortinta Macià, li fariĝis ĉefo de la Esquerra kaj poste prezidanto de la Generalitat, li kontraŭstaris politike –kaj multfoje malliberigis– tiujn samajn aktivulojn, kiujn alitempe li defendis.

Hodiaŭ vi estas la mastroj de la urbo kaj de Katalunio, ĉar nur vi venkis la faŝistajn militistojn, kaj mi esperas, ke vin ne ĝenu, ke en tiu ĉi momento mi memorigis vin pri tio, ke ne mankis al vi la helpo de la multaj aŭ malmultaj lojalaj homoj de mia partio kaj de la gvardianoj kaj la mossos d'esquadra[a] *(...). La vero tamen estas, ke kvankam malmole persekutitaj ĝis antaŭhieraŭ vi venkis la militistojn kaj faŝistojn. Mi ne povas do, sciante kiel kaj kiuj vi estas, uzi alian lingvon krom tiu de granda sincereco. Vi venkis, kaj ĉio estas sub via povo; se vi ne bezonas aŭ ne volas min kiel prezidenton de Katalunio, parolu, kaj mi estos plia soldato en la lukto kontraŭ la faŝismo. Se kontraŭe vi kredas, ke en tiu ĉi posteno, kiun nur mortinta mi estus lasinta antaŭ la venkanta faŝismo, mi povas utili per la homoj de mia partio, mia nomo kaj reputacio en tiu ĉi lukto, kiu, kvankam finiĝas hodiaŭ en la urbo, ni ne scias, kiam nek kiel ĝi finiĝos en la kroma Hispanio, vi rajtas kalkuli pri mi kaj pri mia lojaleco de homo kaj de politikulo, kiu konvenciĝintas pri tio, ke hodiuaŭ mortas tuta estinto da honto, kaj kiu sincere deziras, ke Katalunio marŝu ĉekape de la plej antaŭenirantaj landoj ĉe socia materio."*[32]

Antaŭ tiu ĉi vortoj, eble sinceraj sed ĉiuokaze lertaj, la anarĥiistaj delegitoj povus esti respondintaj, ke la afero ne temis pri li, ke ili estis plene pretaj forgesi la plendojn kontraŭ li, sed ke por "fini unufoje por ĉiam tiun hontigan estinton" nepris transformi radikale la socion, neniigi ĉiujn ĝiajn sociajn strukturojn, kaj ke la *Generalitat* jam estis nenio krom malplena konstruaĵo, kiu apartenas al tiu mortinta estinto, kaj ke tiam la amasoj mem devis findecidi la formojn kaj tipojn de sia propra regado, la memregon sur la kataluna ekonomio per la laboristoj kaj la formojn kaj tipojn de sia nova vivo. Sen forgesi eĉ dum unu sola momento la bezonon subpremi la faŝismon ĉe la tuta duoninsulo. Sekve tio farenda estis doni la vorton al la amasoj, por ke ili decidu, anstataŭ decidi plian fojon anstataŭ ili pere de fikunvenaĵoj pli-malpli sekretaj "ĉe la vertico". Tiu devis esti la unua paŝo cele de tiu transformo, kiu ŝajnis nepra al ĉiuj.

Sed ne estis tiuj vortoj (tre anarĥiistaj tamen), kiujn diris la gvidantoj de la CNT kaj de la FAI al Companys. García Oliver rimarkas, ke en tiu momento "Companys parolis per evidenta sincereco". Tio tre eblas, sed certas, ke tiu estis la sola lingvaĵo, kiun li povis uzi, se li deziris, ke la anarĥiistoj faru cedojn. Se tiuokaze Companys estus volinta imponi sian volon kaj postuli severan disciplinon rilate al la kataluna ŝtato –t.e. se li estus parolinta al ili per la lingvaĵo de reganta registaro–, ili sendube estus kontraŭstarintaj lin, kaj la anarĥiistoj estis sufiĉe fortikaj por kapti la tutan povon. Li sekve estis devigata apelacii iliajn sentojn kaj la kontraŭfaŝisman unuiĝon, rekoni ilian gravecon, flati ilin, kaj gajni tempon, ĉirkaŭriri, eviti alfrontojn. Laŭŝajne surprezitaj de tiu ĉi "sublima gesto de digneco kaj komprenemo" (García Oliver), la anarĥiistoj akceptis "gvidi tra nova vojo" la *Generalitat*on kaj ties prezidenton.

Post atingi ilian akcepton, Companys turniĝis rapide al la esenca celo de la interparolado: la politikaj kombinaĵoj. Li anoncis al la delegitoj de la CNT-FAI, ke "ĉe la apuda salono atendis la reprezentantoj de ĉiuj katalunaj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, kaj ke, se ni konsentus, ke li kiel prezidento de la *Generalitat* kondukis

a Pron.: mosus daskuadra. Kataluna aŭtonomeca polico

32 *Dans la tourmente. Un an de guerre en Espagne* [Ĉe la ŝtormo. Unu jaro de milito en Hispanio]. Parizo: 1938a. Propaganda broŝuro de la ILA.

nin apud ili, li farus proponon por havigi al Katalunio novan organon por daŭrigi la revolucian lukton ĝis atingi la venkon."[33]

La CNT-FAIaj reprezentantoj kunvenis en la apuda salono kun tiuj de *Esquerra, Rabassaires,* Respublikana Unuiĝo, POUM kaj PSUC. Kortuŝanta kunveno tiu ĉi de kontraŭfaŝista unuiĝo, se oni atentas, ke mankis tre malmulta tempo antaŭ ol aperis la latentaj konfliktoj, kiuj vertiĝis per la sangvoplena alfronto de majo de la 1937a.

> *"Companys rakontis al ni, ke konvenis formi Komitaton de Milicoj, kies celo estu orientigi la tutan vivon de Katalunio, ĝisfunde malordigita de la militista ribelo, kaj klopodi organizi la armitajn fortojn por lukti kontraŭ la faŝistoj tie, kie ajn ili sin prezentu, ĉar en tiu momento de nacia konfuzo oni ankoraŭ nesciis la situacion de la ekzistantaj fortoj."*[34]

Tamen la CNT-FAIaj delegitoj deziris konsulti unue sian organizaĵon (oni rajtas sin demandi, kial ili decidis "gvidi tra nova vojo" la *Generalitaton* konsultante neniun ...). "Pleno de la Regiona Komitato" okazis ĉinokte ĉe la "Domo de Cambó"[a], kiu estis okupita de la Prikonstrua Sindikato. García Oliver prezentis la proponon de Companys pri la Centra Milica Komitato. Laŭ li la situacio starigas al ili la sekvantan dilemon: nepris elekti "inter la liberecana komunismo, kiu signifis la anarĥiistan diktatoradon, kaj la demokratio, kiu signifis la kunlaboron". Stranga tamen signifoplena tielo prezenti la demandon: kontraŭstarante ĉiujn ideojn esprimitajn per tunoj da artikoloj kaj paroladoj, la liberecana komunismo je la verhoro aliiĝas al "anarĥiista diktatorado" kaj la CNT-FAI al *politikaj* organizaĵoj, kiuj laŭ tiuj hipotezoj estus uzintaj absolute solaj la *povon*! Kvazaŭ perfekta monerodorso la kunlaboro kun la aliaj politikaj fortoj, la burĝaj respublikaj aŭtoritatoj de Katalunio ktp estis ... la demokratio. Ŝajnas, ke neniu staris por defendi la aliajn ĉimomente eblajn demokratiokielojn, konsilojn de elektitaj kaj eksigeblaj delegitoj, novan Komunon finfine. La dilemo de García Oliver estis falsa dilemo sed signifa pri la pensomaniero de la anarĥiistaj gvidantoj, kiel estis montronta ĝis evidenteco la postaj okazaĵoj. La Regiona Komitato de la CNT-FAI akceptis la konfuzimplikitajn argumentojn de García Oliver kaj proklamis: "Neniom da liberecana komunismo. Unue nepras subpremi la malamikon tie, kie ajn li estu."[35]. Neniu sin ĝenis demontri, ke tio enhavus iun ajn kontraŭdiron.

Tiel oni decidis starigi la Centran Komitaton de Kontraŭfaŝistaj Milicoj de Katalunio. La PSUC kaj la POUM havis ĉiu po unu reprezentanton; la FAI du (Santillán kaj Aurelio Fernández), la CNT tri (García Oliver, Asens kaj Marcos Alcón) kaj la UGT ankaŭ tri reprezentantojn, kio estis senproporcia al ties reala influo. Ŝajnas tamen, ke la CNT-FAI, kiuj pledis pro la UGT, estus dezirintaj favori la sindikatojn "malfavore" de la partioj, kio estis absurdaĵo, ĉar estis la stalinianoj ("homoj de partio" ĝismedole), kiuj monopoligis ekde la unua momento la reprezenton de la UGT. Ankaŭ estis unu reprezentanto de la Unuiĝo de *Rabassaires*[b]

---

33 sl

34 sl

a Pron.: Kambo'

35 Solidaridad Obrera (21a de julio de la 1936a)

b Rabassaire: vitkulturisto, kiu rajtas labori la teron nur dum la vivo de la vitoj

kaj kvar de la respublikanaj partioj (*Esquerra* kaj Respublikana Kataluna Agado[a]). La *Generalitat* estis reprezentata en la Komitato de Milicoj de delegita komisaro, kaj krome ĝi nomis la militistan komandanton.

Kontraŭfaŝistaj organizaĵoj reprezentitaj ĉe la Komitato de Milicoj

La Unuiĝinta Sociista Partio de Katalunio (PSUC)[b]:

Je julio de la 1936a la hispana komunisma movado estis entute tre malforta. Ĝi apenaŭ prikalkulis 30.000 anojn, kio estas ridinda rilate al la sociista aŭ anarĥiista tendencoj.

Ĉe Katalunio ekde la komenco de la 1936a estis pretiĝanta la kunfandaĵo de du etaj sociistaj organizaĵoj, kiujn allogis la stalinismo, kaj la Kataluna Federacio de la Sociista Partio, gvidata de Rafel Vidiella, kiu rompis kun la Hispana Laborista Sociista Partio (PSOE)[c]. La du etaj organizaĵoj estis la Kataluna Proleta Partio (distranĉaĵo de la *Esquerra*) kaj la Sociista Unuiĝo de Katalunio (saturita de naciismo), kies sekretario estis Joan Comorera[d]. La intertraktoj kondukis je la 24a de julio de la 1936a al la starigo de la Unuiĝinta Sociista Partio de Katalunio (PSUC), kiun gvidis la sama Comorera, pri kiu Borkenau diris, ke li reprezentis "politikan sintenon komparebla kun la ekstrema dekstro de la germana socialdemokratio. Li ĉiam rigardis la lukton kontraŭ la anarĥiistoj kiel la ĉefan celon de la sociista politiko ĉe Hispanio."[36] La PSUC aliĝis al la Komintern, kaj tiu sendis al ĝi delegiton, kiu sub la nomo "Petro" (kaŝnomo de Gëroe, la fama hungara stalinisto) gvidis fakte la tutan aktivecon de la partio. La komunista gvidantino Dolores Ibarruri difinas tiel la politikon de la PSUC dum la fruaj tagoj de la revolucio:

> *"Ekde la komenco ĝi disvolvis ekstreme intensan aktivecon tiel kontraŭ la ribelintoj kiel kontraŭ la poumistoj kaj la anarĥiistoj, kiuj imponiĝis per la teruro al la Generalitata registaro; kiuj alpropiĝis al si preskaŭ ĉiujn armilojn de la garnizono ĉe Katalunio kiel ankaŭ la fabrikojn; kiuj estis la mastroj de la stratoj kaj moviĝis tra la kamparo, senkatenigante teruran kaj perfortan ondon, kiu paralizis la kamparanojn."*[37]

La nova partio malgraŭ la socialdemokrata deveno de siaj gvidantoj kaj sia nomo havis neniun aŭtonomecon antaŭ la naciaj instancoj. La PSUC, kvankam ĝi flatis la naciisman sentemon de la kataluna etburĝaro (kiu estis sia ĉefa klientaro), estis nur federacio de la HKP[e] kiel ĉiuj kromaj –kaj kiel ĉiuj kromaj estis submetita al la Politika Komitato kaj memkompreneble al la Komintern.

---

a Katalune: Acció Catalana Republicana [Aksio' Katalana Rapublikana]
b Katalune: Partit Socialista Unificat de Catalunya [Partit' Susialista Unifikat' da Katalunja]
c Hispane: Partido Socialista Obrero Español
d Pron.: Ĵuan' Kumurera
36 BORKENAU, F.: c.v. pĝ 146a (de la hispana eldono).
37 IBARRURI, Dolores: *El único camino* [La nursola vojo]. Moskovo: Eldonoj en Fremdaj Lingvoj, pĝ 532a
e Hispana Komunista Partio. Hispane: Partido Comunista Español (PCE)

La Laborista Partio de Marksista Unuiĝo (POUM[a]):

La stalinistoj malamis la POUM-n, ĉar ĝi estis starigita ĉefe de malkonsentantaj komunistoj, de "renegatoj", inter kiuj ĉeestis iuj el la plej konataj aktivuloj de la hispana komunismo, kiel Andreu Nin, Juan Andrade, Joaquim Maurín[b] ktp.

La stalinistoj karakterizis la POUM-n kiel trotskiistan (aŭ pli precize kiel "trotski-faŝistan"), difino tre uzita de la ĵurnalistoj kaj historiistoj "liberalaj" ĝis Hugh Thomas. Fakte, kvankam Andreu Nin, eksa sekretario de la Ruĝa Sindikata Internacio, Juan Andrade kaj aliaj estontaj gvidantoj de la POUM forlasis la HKP-n por starigi la Komunistan Maldekstron[c], sin bazinte sur tezoj de la trotskiista kontraŭstaro, ili rompis kun Trotski, kiam tiu ĉi ordonis al ili fari "enigismon" en la Sociista Partio, por ke ili formu ene de ĝi revolucian frakcion. Anstataŭ obei lin, ili decidis kunfandiĝi kun la Laborista kaj Kamparana Bloko[d] (antikva kataluna federacio de la HKP, kiu rompis kun tiu ĉi dum la superrego de la "maldekstrega" tendenco en la Komintern, ĉefe ĉar ĝi ne konsentis la aferon pri la "ruĝaj sindikatoj" kaj la katalunan nacian demandon), gvidata de Joaquim Maurín. La Kataluna Komunista Partio, gvidata de Jordi Arquer[e] (kiu ĉiam sin tenis sendependa de la HKP, ĉefe pro katalunnaciismo), unuiĝis kun ambaŭ organizaĵoj por starigi la POUM-n komence de la jaro 1936a. Tamen pri iuj aferoj (ĉefe la kritiko al la stalinismo) la POUM sintenis simile al Trotski –sed ankaŭ al Marceau-Pivert ekzemple.

La POUM ĉeestis preskaŭ eksklusive ĉe Katalunio. Je julio de la 1936a ĝi nombris ĉirkaŭ 3.000 anojn, sed ĝi plikreskis dum la sekvantaj monatoj kaj atingis gravan influon sur iuj katalunaj urboj kiel Ĵirona, Taragona kaj ĉefe Ljejda. Kiam komenciĝis la revolucio, la gvidantaro de la POUM estis sendube tiu, kiu prenis la plej radikalan sintenon rilate al la amasa movado:

> *"La laboristoj, kamparanoj kaj maristoj luktas ne por defendi la malnovan burĝan Respublikon, kiu nenion donis al ili, sed por starigi la reĝimon de la estonto: la Respublikon de la Laboristoj. Tio –ili scias– malgraŭ la propagando de la partio de la Popola Fronto, kiuj klopodas, ke la laboristaj milicoj defendu la nunan konstitucion. Kvankam ĉe Madrido la laborista klaso, konduktata de la Sociista Partio, la UGT[f] kaj la oficialaj komunistoj, ankoraŭ sekvas la ordonojn de la Popola Fronto, ĉe Barcelono kontraŭe la registaro de la Generalitat estas nenio krom oficiala fasado sen nenia povo (...). Sekve ĉe Katalunio ne ekzistas la tiel nomata dueco da povoj, la laborista klaso regas la tutan socion. Tra la sindikatoj la proletaro garantias la efikecon de ĉiuj publikaj servoj kaj de multaj privataj entreprenoj. La ekleziularo kaj la reakciuloj estis senproprigataj, la domojn de la riĉuloj kaj la monaĥejojn oni transformas al instruadocentroj aŭ sanigejoj. Formiĝas komitatoj ĉe la entreprenoj kaj la vilaĝoj, inter la maristoj kaj ĉe la respublikanaj trupoj. Nia POUM, kiu faras ĉion sub sia ebleco por krei novajn kaj interligi ilin, rigardas tiujn komitatojn kiel la bazon mem de la*

---

a Katalune: Partit Obrer d'Unificació Marxista [Partit' Ubrer' Dunifikasio' Marksista]

b Pron.: Andreŭ' Nin, Ĥŭan' Andrade, Ĵuakim' Maŭrin'

c Pri la agado de la Komunista Maldekstro kaj pri tre intereza trotskiista analizo pri la revolucio kaj la milito oni vidu: MUNIS, Georges: *Jalones de derrota, promesa de victoria. Crítica y teoría de la revolución española (1930-1939)*. [Spertaĵoj pri malvenko, promeso pri venko. Kritiko kaj teorio pri la hispana revolucio (1930-1939)]. Madrido: Zero 1977

d Katalune: Bloc Obrer i Camperol [Blok' Ubrer' i Kamparol']

e Pron.: Ĵordi Arker'

f Unión General de Trabajadores [Unjon' Ĥeneral' de Trabaĥadores]: Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj

ĝermanta laborista kaj kamparana Respubliko."[38]

Bedaŭrinde, malgraŭ tiuj belaj vortoj, la POUM ne estis luktonta por tiu laborista aŭtonomeco, por tiuj "komitatoj de bazo", pri kiuj tie ĝi fariĝas vortoportanto, plenkontraŭe ĝi klopodos ĉiam –laŭ sia ebleco– oferi ilin sur la altaro de la iluziaj "traktoj ĉe la pinto" inter burokratoj. Kvankam Trotski kaj siaj partianoj (Félix Morrow kaj poste Pierre Broué) kondamnis la POUM-n, ĉar ĝi ne estis sufiĉe leninista, la tuta historio de la malnova revolucia movado per siaj falsaj venkoj, aŭ plejĝuste dirite siaj malvenkoj, ekde la rusa revolucio ĝis la kataluna revolucio kondamnis ĝin, ĉar ĝi estis *tro* leninista.

La sociista partio, kiu estis tiel fortika ĉe aliaj hispanaj regionoj, ne ekzistis ĉe Katalunio. La kataluna federacio de la PSOE partoprenis la fondon de la PSUC, kiel ni ĵus vidis. Unu el la kialoj de la malmulta influo de la PSOE sur la industria Katalunio estis eble ties jakobena centrismo, kiu kontrastis la naciajn sentojn de la katalunaj sociistoj. Ĉiuokaze ĉe Katalunio produktiĝis tiu kurioza fenomeno, per kiu ĉiuj sociistaj tendencoj finkonfluiĝis ĉu en la PSUC aŭ en la POUM, kaj tiel ili aliiĝis almenaŭ oficiale cŭ al stalinistaj komunistoj ene de la unua aŭ al kontraŭstalinistaj komunistoj ene de la dua. La anoj de la POUM kaj de la PSUC konkuris iun tempon por regi la rakitan katalunan UGT-n (la hegemonio de la CNT estis platiga). Sed baldaŭ la PSUC konkeris ĝin kaj aliigis tiun sindikaton al rifuĝejo por la etburĝuloj timigitaj de la revolucio, kaj al kiuj la POUM evidente ŝajnis tro ekstrema.

La Nacia Konfederacio de la Laboro (CNT) kaj la Iberia Anarĥiista Federacio (FAI):

La CNT, heredinto de la Bakuninistaj movadoj de la Unua Internacio, estis fondata ĉe Barcelono je la 30a kaj 31a de oktobro kaj 1a de novembro de la 1910a de liberecanaj grupoj, ĉefe katalunaj, kaj festis sian unuan ordinaran kongreson je setembro de la 1911a ankaŭ ĉe Barcelono: "Per pli ol 30.000 aliĝintoj ĝi organizis nacian ĝeneralan strikon por protesti kontraŭ la Maroka milito; la registaro reagis elleĝigante ĝin post kruela subpremado. Venĝe Manuel Pardiñas mortigis la ĉefan ministron José Canalejas[a] (novembro de la 1912a), kaj alia anarĥiisto klopodis murdi Alfonson la Trian (aprilo de la 1913a)."[39] Kiel komenco ne malsufiĉas...

Oni rajtas diri, ke la CNT estas organizaĵo senekvivalenta en la tuta internacia laborista movado, ĉar ĝi estas la unusola amasa organizaĵo de la 20a jarcento. Malkaŝite anarĥiista kaj anarĥi-sindikatista ĝi havis tre baldaŭ el 500.000 ĝis pli ol miliono da aliĝintoj je la 1936a, sed je la 1938a ĝi preterpasis la du milionojn kaj duonon. La CNT estis samtempe sindikato laŭ tradicia senco (kiu organizis prisalajrajn kaj repostulantajn strikojn) kaj revolucia organizaĵo (kiu organizis ribelantajn strikojn, atencojn, senproprigojn de bankoj ktp), ĝi havis abundan gazetaron, kiu krome estis multe legata, popolajn eldonejojn, klerigajn rondojn,

38 *La révolution espagnole* [La hispana revolucio] n-ro 1a (setembro de la 1936a)

a Pron.: Ĥose' Kanaleĥas

39 LORENZO, César M.: *Les anarchistes espagnoles et le pouvoir* [La hispanaj anarĥiistoj kaj la povo]. Editions du Seuil, pĝ 45a

vesperajn kursojn por laboristoj ktp. Kiu ajn aktivulo de la CNT povis plenumi kian ajn socian, klerigan, sindikatan aŭ "politikan" agadon ene de la sama organizaĵo. La nursola afero, kiu li devis fari nepre ekster la organizaĵo, estis atingi lian salajron, ĉar ĉe la CNT *estis neniu pagata posteno* ekscepte de tiu de ĝenerala sekretario (kaj ankaŭ tio ne trovas ekvivalenton).

Je la 1927a, sub la diktatorado de Primo de Rivera, ĉe strando de la *Levante* (dum subkaŝita kunveno maskita kiel ekskurso) aro da hispanaj kaj portugalaj anarĥiistoj fondis la FAI-n. Ĝia celo estis disvastigi kaj defendi la anarĥiistan teorian purecon en la sindikatoj de la CNT, dum tiuj ĉi devis organizi la laboristojn, por ke ili taskiĝis pri la regado de la socio. Oni pripaloris multe la "diktatoradon" efektivigatan de la FAI sur la CNT, sed, kvankam la opinioj pri tio malsimilas ankoraŭ nuntempe, paroli pri diktatorado ŝajnas ne ĝusta al mi. La plursignifo de la rilatoj inter la "pura kaj malmola" (se ne "antaŭgvardia") organizaĵo kaj la amasa organizaĵo starigis ja problemojn kaj kreis konfliktojn (kaj ĉiam starigos ilin, dum ekzistos tiaj rilatoj), sed tiuj neniel rajtas esti komparataj kun la "normalaj" de dependeco de la sindikato sub la partio (ekzemple la nuntempaj rilatoj inter la HKP kaj CC.OO[a]). La FAI-n, kvankam ĝi havis regionajn kaj duoninsulajn komitatojn, konsistigis federacio de aŭtonomaj grupoj, kiuj formiĝis preskaŭ ĉiam spontanee per decido de manpleno da anarĥiistoj, kiuj organiziĝis kiel grupo de la FAI. La plej fama sendube estis tiu de Durruti, la fratoj Ascaso, García Oliver, Jover ktp, kiu nomiĝis "la solidaruloj". La fakto, ke pluraj influantaj gvidantoj de la CNT estis aktivuloj de la FAI, kontribuis al la naskiĝo de la legendo pri la diktatorado de tiu ĉi lasta. Sed, se estis influo, tiu estis reciproka, kaj dum la revolucio de la 36a la FAI kaj la CNT, kiuj jam estis intime kuniĝintaj ekde la komenco (siaj signoliteroj aperis ĉiam kune), fandiĝis en un sola movado, kio evidente ne malebligis la konkuradon nek la frakciojn.

La perforteco de la sociaj luktoj dum la monarĥio, dum la diktatorado de Primo de Rivera kaj eĉ dum la Respubliko, la multdaŭraj periodoj de kaŝagado, la senĉesaj armitaj alfrontoj kun la polico kaj la armeo, kun la dungbravulaĉoj de la " libera sindikato" –kreita de la katalunaj dungantoj je la 20aj jaroj– kaj poste kun la falangistoj stampis ĝisfunde la spiriton de tiuj ĉi organizaĵoj. Tial apud ĉiu regiona komitato de la CNT estis kaŝaga Defenda Komitato. Tiu Defenda Komitato prirespondis la rektan agon kaj devis preti anstataŭigi la Regionan Komitaton, okaze tiu ĉi estus arestita –kio okazis ofte. Multfoje la Defendan Komitaton konsistigis aktivuloj de la FAI (sed ne ekskluzive, nek ĉiam). Tiel la FAI fariĝis el "pridoktrina gardisto" al "armita brako" de la CNT, sen forlasi pro tio la pridoktrinajn taskojn: ĝi publikigis siajn proprajn priteoriajn gazetojn –kiel *Teron kaj Liberecon*–, broŝurojn kaj librojn, organizis prelegojn ktp.

La CNT ja estis ankaŭ malcentralizata organizaĵo: la regionaj federacioj ĝuis grandan aŭtonomecon rilate al la Nacia Komitato. Kiel ĉe aliaj organizaĵoj la supera instanco stariĝis principe ĉe la kongresoj. La Nacia Sekretario povis esti reelektita plurfoje, sed tio ne oftis, ĉar ili preferis renovigi ofte plej eble la gvidantajn

a CC.OO.: Comisiones Obreras [Komisjones Obreras] : Laboristaj Komitatoj, unu el la ĉefaj nuntempaj sindikatoj en Hispanio.

postenojn. Plia neskribita sed grava karakterizo de la CNT estis la prestiĝo, kiun ĝuis iuj gvidantoj nomitaj "naturaj", ĉu ili havis aŭ ne prirespondecon ĉe la organizaĵo. García Oliver ekzemple neniam estis nacia sekretatio de la CNT, tamen li estis pli aŭskultata kaj sekvata ol multaj naciaj sekretarioj. Kun Durruti okazis same, tial li "meritis" post sia morto la "profiton" de aŭtentika personeca kulto. Iuj el tiuj "naturaj" gvidantoj estis anoj de la FAI, sed ne ĉiuj. Precize tiuj ĉi malcentralizaj kaj kontraŭburokratemaj organizaĵoj estis tiuj, kiuj, kontaktante la revolucian realon kaj la gravajn publikajn prirespondon (ĉefe ĉe Katalunio), reproduktis per nekredebla rapideco la burokrateman fenomenon: la gvidanta kasto senradikiĝante donis la dorson ne nur al la liberecanaj principoj sed, kio pli gravas, ankaŭ al la amasa revolucia *ago*, serĉante ĉiam kaj ĉie la kompromison, kiam ĝi partoprenis la registarojn (la katalunan kaj la centran), kaj serĉante ĉiam reeniri ilin, kiam ĝi forestis[40].

La katalunnaciistaj respublikanaj organizaĵoj:

"La *Esquerra Catalana* estis amasa partio naskiĝinta je aprilo de la 1931a per la kunfandaĵo de pluraj respublikanaj partioj kaj grupiĝoj de Katalunio. Ĝi sin apogis sur la povoplena kamparana sindikata movado: la Unuiĝo de *Rabassaires*. Ĝia inspiranto kaj instiganto, Lluís Companys aliiam ligata al Salvador Seguí[41], estis dum longa tempo advokato de la CNT[42]". Ni konsentus kun Broué kaj Temime, verkintoj de tiuj ĉi linioj, se oni nuancus la "amasan" karakteron de la *Esquerra*. Reale la *rabassaires*, movado kamparana, respublikana kaj katalunnaciista, konsistigis la ĉefan popolan apogon al la *Esquerra*. Krome la agado de la *Esquerra* dum ĉiuj revoluciaj okazintaĵoj mostriĝis preskaŭ nur pere de la *Generalitat* kaj de la aliaj katalunaj registaraj kaj urbkomunumaj organoj. Pravas, ke dum la jaroj antaŭantaj la militistan ribelon ĝi havis ioman popolan apogon kaŭze de siaj proaŭtonomecaj sintenoj kaj de siaj atingoj tiucele. Lluís Companys, laŭelekta prezidanto de la *Generalitat* kaj de la *Esquerra*, aperis kiel la apostolo de la kataluna aŭtonomeco. Tiu partio, kiu, kiel ni vidos, luktis efike por la legaleco kaj la restarigado de la ŝtata povo, emis al la reformoj ĉe la socia kampo.

Rilate al la Respublikana Kataluna Agado, kiu estis eta partio, ties rolo ŝajnas esti pure dekoracia: ĝi aperis nur ĉe la politikaj kombinaĵoj kiel la Popola Fronto kaj ĉe la kreado de la Komitato de Milicoj. Krom tio ĝiajn spurojn oni trovas nenie dum la revoluciaj okazintaĵoj de Katalunio, ĉu ĉefronte, ĉu ĉepostgvardie.

Plursenceco de la Centra Komitato de Milicoj

Dum sia mallonga ekzisto –el la 23a julia ĝis la 3a oktobra de la 1936a– la Centra Komitato de Milicoj estis samtempe grava aneksaĵo de la *Generalitat* kaj ia komitato

40 Pri la CNT-a historio oni vidu la 4an aneksaĵon

41 Salvador Seguí [Salbado' Sagi'] estis anarĥi-sindikatista aktivulo tre konata ĉe Katalunio je la jarcentkomenco. Farbisto, li naskiĝis en Ljejdo (Katalunio) je la 1890a kaj estis murdata je marto de la 1923a de la pistolistoj de la Libera Sindikato, "flava" organizaĵo kreita de la katalunaj mastroj. Li estis revenĝata de Francisco Ascaso laŭ la plej pura stilo western

42 BROUE kaj TEMIME: c.v. pĝ 36a

kunordiganta la stabojn de la kontraŭfaŝistaj organizaĵoj. Ĝia kreado nepris –kiel manifestis implicite Companys– kaŭze de la karaktero kaj la forto de la CNT-FAI. La anarĥiistoj estis tiuj, kiuj faris preskaŭ ĉion ĉe Katalunio por fiaskigi la militistan ribelon, kaj ankoraŭ kiuj havis preskaŭ la tutan "povon". Estis danĝera lasi ilin solaj. Tiel aŭ aliiel nepris engaĝigi ilin al la respondeco pri la politika povo kaj trudi al ili la kontraŭfaŝisman unuiĝon, kion ili akceptis volonte. Tamen, ĉar ties kontraŭŝtata sinteno malhelpis –dum iomaj semajnoj– al ili partopreni iun registaron, la dubsenca kaj nedaŭra solvo de la Komitato de Milicoj estis la sola, kiu, respektante iliajn principojn, ligis ilin reale al la respondeco pri la registara povo. Dum la revoluciaj momentoj la Povo estis devigata maskiĝi per la "laborista" straso.

Dum la unuaj semajnoj la povoj de la Komitato estis larĝaj, kaj la *Generalitat* limiĝis apogi ties decidojn (tie la vosto estis pli granda ol la kapo). Poste ambaŭ regantaj organoj, kiuj deziris esti la sola reprezentanto de ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, kaj kies funkcioj interkonfuziĝis je la praktiko, malhelpis unu la alian. Unu el la du superfluis. Tial, kiam la CNT-FAI forlasis siajn famajn kontraŭŝtatajn principojn por partopreni la registaron, la Komitato de Milicoj transdonis siajn prerogativojn al la *Generalitat* kaj disvolviĝis la 3an de oktobro. La 26an de setembro la anarĥiistoj partoprenis la Konsilon de la *Generalitat* kaj je la 4a novembra la Centran Registaron.

Kvankam ne ĉiuj konsentas kun la rakonto de García Oliver pri la estiĝo de la Centra Komitato de Milicoj (efektive iuj asertas, ke la ideo estis de la anarĥiistoj, kaj ke Companys akceptis kaj apogis ĝin), estas memkompreneble ĉe la pritakso de la rolo kaj karaktero de la menciita Komitato, kie la diverĝoj aperas pli gravaj. La HKP laŭ sia historio pri la intercivitana milito, sukoriĉa hagiografika provo, vidas je la kreado de tiu ĉi komitato la mallumegan kaj diktatorecan influon de la anarĥiistoj super Katalunio:

> *"Subite eniris la salonon*[43] *grava aro da anarĥiistaj gvidantoj: García Oliver, Durruti, Vázquez, Santillán, Eroles, Portelas, kun pistoloj kaj kartuĉujoj kaj iuj kun fusiloj. Ili venis doni aŭtentikan ultimaton (...). Pere de García Oliver la anarĥiistoj postulis la kreadon de iu Centra Komitato de Milicoj de Katalunio, kio ekvivalentis preni la tutan povon. Ĝia rolo estis "gvidi la revolucion", "elpurigi" la postgvardion kaj "organizi la sendadon de milicoj al Aragono". Ĉiuj la burĝaj partioj "malŝvelis" kaj la reprezentantoj de la UGT kaj de la PSUC*[44] *, praktike izolitaj, povis fari malmulte."*[45]

La konsisto de la komitato –kion mi klarigis supre– malpravigas tiun "trouzon de aŭtoritato" kaj tiun "prenon de la povo" flanke de la anarĥiistoj. La etega PSUC havis 4 reprezentantojn, tri kun etikedo de la UGT, dume la CNT-FAI, kiu ĝuis plenan plejmulton en Katalunio, havis kvin. Rimarkendas, ke ekde tiu ĉi momento kaj tre ofte en la estonto la gvidantoj de la CNT- FAI, kiuj taksis la POUM-n kaj la PSUC-n "aŭtoritatemaj marksistoj", kies familiaj kveleroj interesis ilin ple malmulte, donis

43 La faman salonon, kie la reprezentantoj de la kromaj organizaĵoj atendis la rezulton de la interparolado inter la CNT-FAI kaj Companys

44 Kiu oficiale ne estos starigita ĝis la 24a de julio, sed kiu fakte ekzistis jam antaŭ kelkaj semajnoj

45 *Guerra y revolución en España, 1936-1939* [Milito kaj revolucio en Hispanio]. Moskvo: Progreso. (Tiun verkon redaktis kolektivo da HKP-anoj sub la direktado de Dolores Ibarruri). Vol. 2a, pĝ 8a-9a

preferon al la stalinistoj pro oportunemo. La tuta mondo ja sciis, ke la reprezentantoj de la UGT estis gvidantoj de la ĝermanta PSUC, tamen, tiel tiuokaze kiel je postaj aliaj okazoj, la CNT-FAI insistis pri tio, ke la stalinistoj havu kvar delegitojn, dum la POUM havis nur unu. Tio estis erarego eĉ el la vidpunkto de la politikaj kombinaĵoj, ĉar malgraŭ ĉiuj diferencoj la POUM estis multe pli proksima al la CNT-FAI ol al la stalinistoj.

Laŭ Companys kaj ties amikoj de la *Esquerra* la Komitato de Milicoj estis la plej eta malbono, transira organo, kiu povis garantii ordoŝajnon, organizi la sendadon de milicoj al la fronto kaj ankaŭ politikan kompromison pri unuiĝo de la kontraŭfaŝistaj fortoj. La burĝaj respublikanoj, kies celo estis restarigi la malnovan laŭleĝan povon, la *Generalitaton* kaj la komunumajn konsilojn, je la malutilo de la revoluciaj laboristaj komitatoj, fidis ĉiam je ĝia transira karaktero.

Plendelirante identiĝon kun la rusa revolucio, la trotskiistoj vidis en tiu ĉi Komitato de Milicoj la "laboristan registaron de la laborista revolucio", ĉirkaŭ kiu laŭ Félix Morrow "estis formiĝintaj sennumeraj komitatoj de fabriko, de kvartalo ktp"[46]. Fakte la Komitaton de Milicoj oni kreis flanke de kaj super la sennumeraj komitatoj, kiujn formis preskaŭ ĉiam spontanee la revolucia amaso. La staboj de la politikaj kaj sindikataj organizaĵoj estis tiuj, kiuj, solaj kaj sen neniu kontrolo nek partopreno de la laboristaj komitatoj, elektis la anojn de la Komitato de Milicoj. Pri tiu ĉi punkto rimarkendas, sen rezigni reparoli pri tio, ke neniam neniu elektis la anojn de la Komitato de Milicoj, samkiel neniam neniu elektis la tiam estontajn ministrojn (aŭ *consellers*[a], kiel oni nomis ilin) de la *Generalitat*; ĉiuj ili estis enoficigataj fingromontre de la staboj de la politikaj organizaĵoj proporcie al –ties fortorilatoj kaj ties kombinoj. Tio ne estis la laborista demokratio, sed pli precize la diktatorado de la staboj de la laboristaj organizaĵoj.

Laŭ la gvidantoj de la CNT-FAI la Komitato de Milicoj enkorpiĝis la realan povon, la *Generalitat* estis laŭ ili nur pupa ŝajnregistaro destinata nursole al la trankviliĝo de la okcidentaj demokratioj. Tio estas la sola kialo, por ke ĝi daŭru. Temis evidente pri *nursola* povo laŭ la linio adoptita de la gvidantaj instancoj de la katalunaj anarĥiistoj. Jen kiel parolas Abad de Santillán pri la rolo de la Komitato de Milicoj:

> *"La Komitato de Milicoj estis rekonata kiel la sola reala povo ĉe Katalunio. La Generalitata registaro daŭrigis sian ekzistadon kaj meritante nian respekton, sed la popolo obeis neniun povon krom tiun, kiu stariĝis danke la venkon kaj la revolucion, ĉar la popola venko estis la socia kaj ekonomia revolucio (...)"*

La prerogativoj de la Komitato estis tre larĝaj:

> *"Starigado de la revolucia ordo ĉe la postgvardio, organizado de fortoj pli malpli enkadrigitaj por la milito, instruado de oficiroj, lernado de transsendoj kaj signaloj, proviantado kaj vestaro, ekonomia organizo, leĝdona kaj juĝa agado; la Komitato de Milicoj estis ĉio, prizorgis ĉion, la aliigon de la industrio al milita industrio, la propagandon, la*

46 MORROW, Félix: *Revolution and Counter-Revolution in Spain* [Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Hispanio]. Nova Jorko: Pionner Publishers 1938, pĝ 63a

a Pron.: kunsaljes': Konsilianoj

rilatojn kun la Madrida registaro, la helpon al la luktopunktoj, la rilatojn kun Maroko, la kulturadon de la disponeblaj teroj, la kuracadon, la gardadon de la marbordoj kaj landlimoj kaj milojn da plej diversaj aferoj. Ni pagis la milicanojn, ties familianojn, la vidvinojn de la luktintoj; per unu sola vorto: iomaj dekoj da individuoj prizorgis la aferojn, kiuj postulas multekostan burokrataron al ajna registaro. La Komitato de Milicoj estis samtempe Primilita Ministrejo ĉe milita tempo, Ministrejo pri Internaj Aferoj kaj Ministrejo pri Eksteraj Rilatoj, kaj ĝi inspiris similajn organojn ĉe la ekonomia kaj kleriga sferoj."[47]

Sub la protekto de la Komitato de Milicoj kreiĝis serio da komisionoj aŭ subkomitatoj respondecaj pri konkretaj taskoj, kiel ekzemple la Komitato pri Provizumo, kiu principe respondecis pri la kontrolo de la prezoj, la vendejoj kaj ĝenerale pri la tuta nutraĵa komerco kaj ankaŭ pri la provianto al la milicoj de la fronto, al la "kontrolpatroloj" kaj al la loĝantaro (restoracioj, malsanulejoj, ktp). "Ĝi estis konsistigata de delegitoj el la diversaj partioj kaj sindikatoj (3 de la CNT: Valerio Mas, Facundo Roca kaj Juan José Domènech[a]; 2 de la FAI: Juanel kaj Manuel Villar[b]; 3 de la UGT, 1 de la POUM, 3 de la *Esquerra*, 1 de la Unuiĝo de *Rabassaires*, 1 teknikulo). Reale la CNT-FAI estis tiu, kiu direktis la Komitaton, kaj kiu efektivigis la plejparton el la laboro; efektive, kvankam la prezidanteco –nure honora– estis oficiita de la katalunnaciisto Pujol[c], Juan José Domènech plenumis la funkciojn de ĉiopova ĝenerala sekretario. Ĉe la Barcelonaj antaŭurbaj kvartaloj kaj ĉe ĉiuj la katalunaj vilaĝoj formiĝis komisionoj dependantaj de la Centra Komitato pri Provizumo."[48]

Oni kreis ankaŭ la jam cititan Konsilon pri la Nova Unuiĝinta Lernejo, kiu, konsistigita de reprezentantoj de la sindikatoj kaj de la universitato, havis iel la respondecon pri la entutaj problemoj de la instruado, inklusive pri la modifo de la studprogramoj.

Relative al la "publika ordo" kaj al la "justeco" la aferoj estis pli mallumegaj. La komenca ideo estis, ke oni devas eviti la trouzojn kaj elpostulaĵojn, kiujn estus povintaj fari proprainiciate iuj "nekontrolitaj" individuoj aŭ grupoj. Tial –kiel ĉiam en la historio, ne nur en la historio de la revolucioj– tio, kion oni faris, estis klopodi "laŭleĝigi" la trouzojn kaj la elpostulaĵojn. La rezulto estis antaŭvidebla, ili ne estis evititaj, ili ne estis limigitaj, oni faris nenion krom aldoni al la individuaj kontoalĝustigojn la "laŭleĝajn" ekzekutojn, sen mencii la interorganizajn kontoalĝustigojn, pri kiuj ni havos okazon reparoli. Per unu sola vorto: oni nur "diversigis" la subpremadon, kiu efektiviĝis ne nur kontraŭ la faŝistoj, eĉ ne nur kontraŭ la suspektuloj pri tio.

Kiel mi jam rimarkis, la policaj korpusoj (la Civila Gvardio kaj la Sturma Gvardio) estis dissolvitaj komence por esti restarigitaj poste. La "kontrolpatroloj" sin taskis pri la "publika ordo" almenaŭ dum tiu periodo. Laŭ César M. Lorenzo estis 700 homoj

47 ABAD DE SANTILLAN, Diego; *Por qué perdimos la guerra* [Kial ni malvenkis la militon]. Madrido: G. del Toro 1975, pĝ 79a kaj 91a

a Pron.: Balerjo Mas, Fakundo Roka, Ĥŭan Ĥose' Dumenak

b Pron.: Ĥŭanel' kaj Manŭel' Biljar'

c Pron.: Puĵol'

48 LORENZO, César M.: c.v. pĝ 114a-115a

en la kontrolpatroloj ĉe Barcelono (325 de la CNT, 145 de la UGT, 45 de la POUM, 185 de la *Esquerra*):

> *"... direktitaj de la Centra Komitato pri Patroloj, konsistigita de 11 delegitoj de sekcio (4 de la CNT, 3 de la UGT, 4 de la Esquerra); la anarĥi-sindikatista José Asens estis la ĝenerala sekretario."*

Kiel oni vidas, la anarĥiistaj (!) ĝeneralaj sekretarioj svarmis.

> *"(...) Ili agis kunordigitaj kun la Komisiono pri Esploro, kiu devenis el tiu pri sekureco de la Centra Komitato de Milicoj. Tiu komisiono, gvidita de la anarĥiisto Aurelio Fernández, estis speco de sendependa ministerio pri internaj aferoj aŭ de servo pri revolucia sekureco (...).*
>
> *Tamen krom la Komisiono pri Esploro ekzistis policaj fortoj organizitaj de ĉiu partio aŭ sindikato, kiuj dependis nur de siaj respektivaj gvidantaroj: tiuj estis la famaj "ĉokoj"[a], tiom timegaj kun ties sekretaj agentoj, ties kaŝitaj malliberulejoj, ties pikedoj. Tiu de la CNT, sub ordonoj de Manuel Escorza, estis la plej grava kaj la plej perfektigita."*[49] *(!?)*

Estas sufiĉe ririnda vidi anarĥisimpatianton, kiel César M. Lorenzo-n, kiu laŭdas la policon, krome la policon de la –"ĉokoj". Kvankam tio ne plaĉos nian aŭtoron, tiu de la CNT ne estis tiu, kiu faris "la plej bonan laboron", tio estas, ni parolu klare, tiu, kiu torturis kaj murdis pli da homoj (el kiuj nur eta parto estis faŝistoj), sed tiuj estis –kiel sia nomo jam montras– la "ĉokoj" de la sovetianaj agentoj kaj de ties kunlaborantoj de la KI kaj de la HKP. La stalinista teroro ĉe Hispanio estis tiu, kiu estis la plej bone –kun granda avantaĝo– organizita kaj la plej efika (ĉe la "respublikana kampo", oni komprenas, ĉe la "alia bando" la afero estis ankoraŭ pli malbona).

Tiuj, kiuj estis arestataj pro imagaj aŭ realaj akuzoj kaj postvivantaj la diversajn "ĉokojn", la senkontrolajn ekzekutojn kaj aliajn *promenadojn*, troviĝis, kiam ili atingis la tribunalojn, antaŭ ĝisfunde reformita jura sistemo.

> *"... revoluciaj tribunaloj (instalitaj ĉe provincaj ĉefurboj: Taragono, Ĵirono kaj Ljejdo), kie interdiskutis la delegitoj de la sindikatoj kaj partioj. La Komitato pri Justico de Katalunio kaj la Prijura Kabineto havis siajn ĉefejojn ĉe Barcelono, tie superregis (?) la advokatoj Barriobero kaj Angel Samblancar, ambaŭ CNT-anoj. Tiuj organoj plenumis geedzigojn kaj eksgeedzigojn, findecidis civitajn kaj komercajn pledojn, persekutis spekulaciistojn, juĝis la ribelintojn, la suspektindojn kaj la senrespondeculojn ktp. Antaŭe oni elpurigis akurate la primalliberulejan administradon, la juĝistaron kaj la tribunalojn, oni refaris ĉion ĝisfunde, kaj la proceduroj estis simpligitaj, oni nuligis aŭ detruis la juĝdosierojn antaŭajn ol la 19a de julio; finfine estis neniigitaj la prijuĝajn kostojn."*[50]

Broué kaj Temime notas la socian kaj politikan konsiston de la Revolucia Tribunalo de Ljejdo, kiu estis "tute konsistigita de laboristoj, unu trionon nomis la POUM, unu trionon la UGT kaj unu trionon la CNT-FAI. La prezidanto Larroca –de la CNT– kaj la prokuristo Pelegrín –de la POUM– estis fervojistaj laboristoj"[51].

---

a Hispane: checa [ĉeka], nomo devenanta el Ĉ.K. komencaj literoj de la rusa nomo de la unua sovetiana politika polico

49 sl pĝ 115a-116a

50 sl pĝ 116a

51 BROUÉ kaj TEMIME: c.v. pĝ 123a

Ŝajnas, ke dum la fruaj semajnoj de la revolucio oni faris gravajn reformojn al la juĝa sistemo, tamen ili estis nuligitaj, kiel ĉion kroman, per la kontraŭrevolucia restarigado de la ŝtato.

Kontraŭe al tio okazinta ĉe aliaj revolucioj, estis ne la "Revoluciaj Tribunaloj" tiuj, kiuj senbriĝis al la plej malbonaj trouzaĵoj de subpremado, sed la paralelaj policoj de la partioj kaj siaj mallumegaj "ĉokoj", kiuj milfoje plipreferis "malaperigi" siajn malliberulojn ol sendi ilin al tribunaloj, kiuj ĉu ne estis ĉiam sufiĉe senteblaj al ties partiista vidpunkto aŭ estis submetitaj al nepreciza kontrolo de la publika opinio (fremdlandaj observantoj ktp).

Tiusence estas tre simptoma, ke ĝenerale oni akuzis la "kontrolpatrolojn" aŭ la hipotezajn "nekontrolitulojn" pri tio, ke ili estis la solaj respondeculoj pri la trouzoj faritaj ĉe Katalunio. Nenion oni diris pri la kreskanta severeco de la tribunaloj ĉiam pli submetitaj al la politika kontrolo de la Centra Registaro ekde la 1937a, kaj oni eĉ kuraĝis, kiel sciite, kanti laŭdojn al la "ĉokoj", al ties "sekretaj agentoj", al ties privataj karceroj kaj al ties pikedoj!

Krome ĉar la anstataŭigo de la malnovaj policKorpusoj per patroloj de armitaj laboristoj estas unu el la plej elementaj aranĝaĵoj por la publika sanigo, kaj ĉar estas groteske kompari la perforton –eble blinda– de izolitaj grupoj, de "nekontrolitoj", kun la sistema kaj organizita subpremado, al kiu sin dediĉis la politikaj organizaĵoj, ĉefe la HKP.

Ĉe Katalunio, kiel okazas en ĉiuj la aŭtentikaj revolucioj, la unua impulso estis malfermi la malliberulejojn tiel por la pripolitikaj kiel por la komunjuraj malliberuloj. Poste, kiam ili plenpleniĝis denove, tio estis unu el la montriloj –kaj ne la plej malĉefa– pri la antaŭeniro de la kontraŭrevolucio. La subpremanta aparato –tribunaloj, policoj, malliberulejoj, koncentrejoj, torturoj, ekzekutoj ktp– estas nenio krom la plej kruda kaj rekta esprimo de la hierarĥieco de la aŭtoritataj socioj disigitaj je gvidantoj kaj plenumantoj. Hierarĥio kaj subpremanta aparato estas nedisigeble kunigitaj kaj sanktigitaj antaŭ jarcentoj de valorsistemoj same hierarĥiaj.

Tamen hodiaŭ kiel hieraŭ ĉe Katalunio kaj kie ajn staras antaŭ ni la demando, ĉu la revolucio signifas la instalon de *bona* hierarĥio (laborista ŝtato) kun ties *bonaj* koncentrejoj, ties *bonaj* ekzekutplotonoj, ties *bona* torturo ktp, aŭ ĉu estas revolucia precize ĉio, kio emas rompi la regulojn de la socia ludo, malfermi ĉiujn malliberulejojn, neniigi ĉiun hierarĥion –kaj sekve ĉiun subpremadon. Ĉar kiu ajn estu la historiaj nuancoj, la socia hierarĥio ("maldekstra" aŭ "dekstra", "laborista" aŭ "burĝa") ĉiam estas fonto de subpremado, de ekspluatado, de senigado, kaj ne eblas deziri lukti kontraŭ tio ĉi sen lukti ankaŭ kontraŭ tio.

Sekve oni rajtas diri –kaj des pli bone, se tio mirigas iujn–, ke praktike ne gravas scii, *kiu* estas en malliberulejo –ĉar finfine tio estas nenio krom malliberuloj kaj tiuj, kiuj gardas ilin, malliberistoj–, estas la malliberulejo tio, kio fariĝas netolerebla. Mi parolas tie ĉi nur pri la politika subpremado je ties plej rekta senco, sed evidentas, ke la hierarĥio kaj sia subpremanta kolorario troviĝas tiel ĉe la entuta socio, kiel ĉe ĉiu

socia korpo konsistiganta ĝin, ekde la familia ĉelo ĝis la industria entrepreno, tra la "antaŭgvardiaj" partioj, kiuj fariĝas nekoncepteblaj, ĉar hierarĥiaj, sen sia subpremanta aparato, sen siaj kontrolaj kaj disciplinaj komisionoj, sen siaj spionoj kaj fisufloroj, sen sia ritaro pri forpeloj kaj juĝoj foje realaj (partioj ĉe la povo) foje simboligaj: la forpelito *malaperas*, sia nomo, sia fotografiaĵo malaperas de la hagiografiaj libroj ktp.

La persisto de la subpremantaj aparatoj ĉe Katalunio montras taŭge inter alie la persiston de la subpremantaj hierarĥiaj strukturoj, kontraŭ kiuj tamen la amasoj iniciatis mortolukton –komence ne sensukceso. Evidente tiu subpremado ne efikis reale por la "revolucidefendo" nek por la lukto kontraŭ la "maskitaj faŝistoj". La kapitalisma sistemo estis dispecigita de la spontanea amasa ago; la burĝoj, kiuj estis politike malamikaj, ĉu forkuris aŭ rifuĝis ĉe la kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, kiuj deziris akcepti ilin –ĉe Katalunio ĉefe la UGT.

Krom iomaj centoj da falangistoj kaj frankistoj arestitaj aŭ mortpafitaj la subpremado efektiviĝis ĉefe sur iuj kompatindaj uloj de "dekstro" aŭ "vizitintaj la meson", kiuj memkompreneble reprezentis nenian danĝeron, kaj ĝi plivastiĝis kaj atingis sian realan plenreakcian sencon per la subpremado kontraŭ revoluciuloj aŭ kontraŭ aktivuloj de kontraŭaj organizaĵoj (spegulaĵo de la lukto de la politikaj burokrataroj pro la povkonkero). La premion, ni ripetu, gajnis la hispanaj stalinistoj gvidataj de sovetianaj konsilantoj, kiuj furiozis kontraŭ la POUM kaj iu anarĥiista sektoro. Kiel ni vidos, oni atingis la virtuozecon. La subpremado ĉiam estas la esprimo de la reakcio, kiu ajn estu la polika koloro aŭ la sociaj intereson de tia *reakcio*[52].

Tiel ĉekampe de la "publika ordo" kiel ĉekampe de la "justeco" la politika povo de la Centra Komitato de Milicoj koliziis kun serio da partikularaj povoj de senfina varieco. Ĉe ĉiuj la katalunaj urboj kaj vilaĝoj la malnovaj komunumaj konsiloj estis deflankigitaj aŭ simple elpelitaj kaj anstataŭigitaj de Revoluciaj Komitatoj. Tiuj siaflanke estis ĝenerale formataj surbaze de la kontraŭfaŝisma unuiĝo. Ĉiu revolucia komitato de ĉiu urbo aŭ vilaĝo estis aparta kazo. Tiel, kvankam komence konsistis el delegitoj de la loĝantaro –elektitaj kaj senvalidigeblaj–, fakte preskaŭ neniam okazis aŭtentikaj balotadoj. Foje tiaj balotadoj okazis nursole ene de iuj organizaĵoj por scii, kiuj devis reprezenti la organizaĵojn ĉe la Revolucia Komitato. Ĉar, kiel ĉe preskaŭ ĉiuj komitatoj, elektitaj aŭ ne, de "bazo" aŭ ne, la delegitoj fakte reprezentis ne la tuton –aŭ la plimulton– el urbo aŭ vilaĝo (aŭ entrepreno okaze de la memregaj komitatoj), sed ili reprezentis tiun aŭ tiun alian organizaĵon ĉe tiu aŭ tiu alia revolucia komitato. Mi priparolos denove la monopolon de la organizaĵoj pri tuta la politika kaj

52 Tial fariĝas aparte ridinda, ĉar groteska, vidi kiel eĉ nuntempe preskaŭ ĉiuj grupetoj nomiĝantaj kontraŭaŭtoritataj sin dediĉas volupte al la similigado (ĉar ili ne povas fari plu) de la subpremado. La ritaro de la forpeloj, kiu imitas tiun de la "revoluciaj tribunaloj", la punbatadoj, imitado de la ekzekutoj, kaj ni ne parolu pri la karceroj kaj tribunaloj de la popolo aŭ pri la organizo de la "ordoservoj", ĉiam pli militistsimilaj, kiuj batas aŭ ne batas sub ordono kiel ajna polico, kun kiu ili partoprenas la "ordotenadon"; la tuta subpremanta armilprovizejo, kiu obeas ĉiam moralan ordon (eĉ aŭ precipe kiam tiu morala ordo pretendas esti revolucia), montras ĝis evidenteco la persiston de la subpremanta hierarĥio ĉe la organizaj strukturoj kaj ĉe la cerbo de la aktivuloj, tiuj monaĥoj-.soldatoj de la nuntempo.

socia vivo (kaj eĉ pri la ĉiutaga vivo) ĉe Katalunio. Ekstere de organizaĵo individuo ne ekzistis.

La katalunaj urbaj kaj vilaĝaj revoluciaj komitatoj ĝuis fakte grandan aŭtonomecon rilate al la Centra Komitato de Milicoj. Ili deziris mastri sin mem kaj preskaŭ ĉiam sukcesis. Krom tiu loka aŭ regiona aŭtonomeco estis la aŭtonomeco de ĉiu organizaĵo rilate al la Centra Komitato. La anarĥiistoj obeis la ordonojn de la Komitato de Milicoj, kiam la CNT-FAI petis tion al ili, t.e. ili obeis sian organizaĵon –kaj ne ĉiam.

Same okazis ĉeflanke de la aliaj partioj. Rilate al la grandioza spontanea movado de la kolektivigoj la Komitato de Milicoj, kiel ĉiuj povorganoj kaj staboj de ĉiuj organizaĵoj, limiĝis atesti mirigita ties vastecon, antaŭ ol streĉi direkti kaj submeti ĝin.

Laŭ mia opinio la Komitato de Milicoj estis ne la "laborista registaro de la laborista revolucio", nek formo originala kaj nedeterminita de "revolucia povo". Antaŭ ĉio ĝi havis transiran rolon, kiu liveris ian provizorecon iel improviza ĝis la reveno de la "laŭleĝa" povo al la *Generalitat* –kiu, siaflanke, estis delegacio de la centra respublika povo.

La burĝa-stalina interligo

La PSUC havas apartan lokon ĉe la kontraŭfaŝista interligo. Efektive, se la anoj de la CNT-FAI kaj de la POUM pensis defendi la revolucion, kiam ili kunlaboris kun la Generalitat, la gvidantoj de la PSUC siaflanke estis firme deciditaj subteni la Generalitaton *kontraŭ* la revolucio.

Kiel kompensilo de la Laboristaj Milicoj Comorera proponis al Companys la starigadon de "Milicoj de la Generalitat", tamen la burĝaj politikistoj pensis, ke pli gravis restarigi unue al la Generalitat tutan la regantan aŭtoritaton. La 2an de aŭgusto Casanovas[a], de la *Esquerra,* faris provon tiurilate helpita de la stalinistoj. Li formis registaron de "popola fronto" enhavanta tri reprezentantojn de la PSUC: Comorera, ministro pri ekonomio, Ruiz, ministro pri provizumo kaj Vidiella[b], ministro pri komunikoj. T.e. pri tri sektoroj, en kiu estis firmiĝinta tiu aŭtonomeco, kiun ili sukcesis likvidi.

Sed la CNT-FAI reagis vigle, ĉar ĝi rigardis tiun operacion kiel manovron kontraŭ la Komitato de Milicoj kaj kontraŭ si mem:

> *"Dum estis okazanta la unua kunveno de la kataluna registaro de la Popola Fronto sin prezentis ĉe la Generalitat delegitaro de la Komitato de Milicoj de la FAI kun la sekvanta ultimato: ĉu la registaro dissolviĝas tuj, aŭ la Komitato de Milicoj alprenos la povon."*[53]

a Pron.: Kazanobas
b Pron.: Bidielja
53 IBARRURI, Dolores: c.v. pĝ 532a-533a

La registaro vidiĝis devigata memdissolvi la 8an de aŭgusto, sed, kiel poste skribis la komunista gvidantino Dolores Ibarruri: "Oni estis doninta la unuan paŝon por disrompi la premon anarĥi-trotskiistan."[54]

Dum ĝi atendis povi ataki rekte la anarĥiistojn kaj la POUMistojn kaj, trans ĉiuj ili, la revoluciajn atingojn, la PSUC strecis disvastigi sian influon, iĝinte la defendanto pri la interesoj de la eta kaj meza burĝaro. Ĝi taskiĝis tuje pri la regiona (kataluna) sekcio de la UGT, kiu agis sendepende de la Nacia Komitato kontrolita de Largo Caballero[a], kaj lanĉis la devizon: "Defendi la propraĵon de la eta industriulo". La kataluna sekcio influis tre malmulte la proletaron; aliĝis al ĝi ĉefe iuj pribankaj oficistoj kaj alta pocento da ŝtat- kaj komunumooficistoj. Iomaj tagoj post la venko sur la militistoj la CADZI, la centra sindikato de la oficistoj de la privata ambito, rifuĝis ĉe la UGT. La pocento de la "blankaj kolumoj" pligrandiĝis, kiam oni dekretis la devigan "sindikatiĝon" (aliĝon al iu sindikato) de ĉiuj la oficistoj, ĉar la plejmulto alfluis al la UGT, pli kongrua kun iliaj interesoj –kredis ili– ol la CNT.

Aliflanke la stalinistoj organizis rapide alian sindikaton ankaŭ aliĝitan al la UGT, la GEPCI-n (Kataluna Federacio de Gildoj kaj Korporacioj de la Etaj Komercistoj kaj Industriuloj), kiu volis defendi la interesojn de la 18.000 komercistoj, metiistoj kaj etaj industriuloj kontraŭaj al la kolektivigoj. Tiel la katalunaj stalinistoj asociiĝis kun la *Esquerra* kaj sin apogis sur la mezaj klasoj timigitaj de la revolucio, kaj penis aliigi la revolucian lukton kontraŭ la faŝistoj al defendo de la respublika leĝeco kaj burĝa ordo, apogiĝante sur ĉio, kio restis konservativa ĉe la lando, por neniigi la sociajn transformojn, kiuj malvolviĝis senĉese.

Ĝis kiam la burĝa-stalinista interligo restarigis la povon de la *Generalitat*, la Komitato de Milicoj ne kontraŭstaris tro ferme la amasan iniciaton kaj faris ankaŭ nenion por bremsi la suprenirantan revolucion. Kontraŭe la revoluciaj organizaĵoj (la CNT-FAI kaj la POUM) eniris ĉiam plie la vojon de la kunlaboro kun la burĝaro submaske de la kontraŭfaŝista unuiĝo. Tiel la Konsilo pri Ekonomio, kiun konsistigis (plian fojon) ĉiuj la kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, kaj kiu estis kreata la aŭgustan 11-an kaj laŭleĝigata du tagojn poste, adoptis kiel celon la reguligon de la "problemoj starigitaj de tio, ke la laboristoj regas gravan parton de la kataluna ekonomio"[55]. Tio, se oni parolas klare, signifas novan provon flanke de la staboj por forpreni la regadiniciaton al la laboristoj. Pravas, ke la "programo" de tiu konsilo estis sufiĉe multe radikala[56], tamen dumaŭguste de la 1936a tio ne povis esti aliiel sen provoki gravan konflikton kun la ĉefrolulo de la kolektivigoj: la amaso de la laboristoj.

Momente la ofensivo kontraŭ la laborista aŭtonomeco kun siaj paroladoj, sekretoj kaj manovroj post la kuliso restis ofte senefikaj. La 9-an de setembro publikiĝis "dekreto", per kiu la *Generalitat* kontrolis la tutan minan, industrian kaj manufakturan produktadon kaj ankaŭ la importadon de "plumbo", sed por ke tiu ĉi dekreto efektivigu tiun operacion (pretigitan kun la PSUC), kiu jam fiaskis komence

54 sl

a Pron.: Largo Kabaljero

55 *La Révolution Espagnole* [La hispana revolucio] n-ro 1-a (setembro de la 1936a)

56 Oni vidu la 4-an ĉapitron pri la kolektivigoj

de aŭgusto, nepris la starigado de "popolfronta registaro", t.e. la restarigado de la *Generalitat*a povo, apogata de ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj. La CNT-FAI kaj la POUM, kiuj malebligis la unuan provon tiucele, la registaron Casanovas de la 2-a aŭgusta (sendube ĉar ili ne estis reprezentataj ĉe tiu kombinaĵo), tiuokaze estis pretaj akcepti tian interligan registaron (kondiĉe, memkompreneble, partopreni ĝin).

Sekve la 26-an de setembro oni formis novan registaron, en kiu estis reprezentataj ĉiuj la kontraŭfaŝistaj organizaĵoj: 3 anoj de la *Esquerra*: Tarradellas (financo), Ayguadè (sekureco) kaj Gassol (kulturo); 3 anarĥiistoj: Fàbregas (ekonomio), Domènech (provizumo) kaj Birlán (sano); 2 komunistoj : Comorera (publikaj servoj) kaj Valdés (laboro); 1 *rabassaire*: Calvet (kampokultivado); 1 ano de la POUM: Nin (justico); 1 ano de Kataluna Agado: Closas[57]. Jam travidebliĝis la falsa elekto, kiu poste rolos tiel grave, inter revolucio kaj milito.

Kiel skribis la respublikana juristo Ossorio y Gallardo, biografo pri Companys:

> *"La Generalitat estis ankoraŭ organismo pure formala, sed Companys, kiu agnoskis la rajton regi al la laboristoj, kaj kiu eĉ oferis al ili forlasi sian postenon, manipulis la aferon per tia lerteco, ke iom post iom li sukcesis restarigi la legitimajn organojn de la Povo, transdoni la agon al la konsilianoj kaj postenigis la laboristajn organojn al ties rolo de helpantoj, subuloj kaj efektivigantoj. Post kvar aŭ kvin monatoj la situacio estis renormaligita."*[58]

Estas tute klare: la "normala situacio" estas tio, ke la registaro regas, kaj ke la laboristaj organizaĵoj estas ties helpantoj kaj efektivigantoj.

Ĉar ĉiuj la kontraŭfaŝistaj organizaĵoj jam estis reprezentataj ĉe la *Generalitat*, la provizoreco de la Komitato de Milicoj apudiĝis al sia fino. La 3an oktobran oni publikis dekreton, kiu "dissolvis la Centran Komitaton de Kontraŭfaŝistaj Milicoj". Tiun sekvis aliaj dekretoj same signifoplenaj:

> *"11an de oktobro: dekreto, per kiu oni ordonas la dissolvon de ĉiuj lokaj komitatoj, kiuj, fonditaj tra la tuta Katalunio, malhelpis kaj malebligis la registaran agadon. Tiun dekreton akompanis alia de la Departemento pri Interna Sekureco, per kiu estis fiksata tempolimo por la enoficigo de la novaj komunumaj konsiloj ĉe la tuta Katalunio. La lokaj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj devis nomi la novajn konsilianoj laŭ la sama proporcio, kiu estis ĉe la Konsilo de la Generalitat.*
>
> *27an de oktrobro: dekreto, per kiu oni ordonas la redonon de la longaj armiloj (fusiloj kaj maŝinpafiloj).*
>
> *28an de oktobro: dekreto, per kiu oni militistigas la milicojn. En tiu ĉi dekreto staras, ke la Konsilo de la Generalitat kontrolas novan kodon pri militista juro, sed ke, dum oni atendas ties aprobon, la milicoj subiĝas al la nune valida kodo pri militista juro."*[59]

Kiel videblas, la *Generalitat* ne perdis tempon por klopodi restarigi "la aferojn laŭorde". La CNT-FAI kaj la POUM, reprezentitaj ĉe la kataluna registaro, akceptis

57 Citita de RABASSAIRE, H.: *Espagne, creuset politique* [Hispanio, politika vojkruciĝo]. Parizo: Editions Fustier 1938a

58 OSSORIO Y GALLARDO: c.v. pĝ 176a

59 MARTIN, J. R.: *La transformation politique et sociale de la Catalogne* [La politika kaj socia transformo de Katalunio]

kaj aprobis tiujn aranĝojn. Tiel oni povas legi ĉe *La Batalla* de la 28a oktobra de la 1936a la tekston sen komentoj de la dekreto pri senarmiligo de la kamparanoj kaj laboristoj:

> *"Artikolo 1a: Ĉiuj longaj armiloj (t.e. la fusiloj , la maŝinpafiloj ktp), kiuj estas ĉemane de la civitanoj, devos esti donitaj al la urbokomunumoj, aŭ forprenitaj de tiuj, je la tempolimo de ok tagoj post la publikigo de tiu ĉi dekreto. Tiujn armilojn oni devas deponi en la ĝeneralajn kazernojn de artilerio kaj en la Ministrejon pri Defendo de Barcelono por helpi la frontbezonojn.*
>
> *Artikolo 2a: Tiujn, kiuj konservis tiajn armilojn sub sia povo post la tempolimo, oni konsideros faŝistoj kaj estos juĝitaj per la severeco, kiun meritas ties konduto."*

Pri la rolo de la Centra Komitato de Milicoj mi abunde traktas, kaŭze de la ekzegecoj pri tiu afero, kiujn faris la diversspecaj ideologiistoj de la "laborista movado". En tiu ĉi okazo, kiel en aliaj, niaj teoriistoj penadas je la senfrukta serĉado de la loko, kie kuŝis la *bona povo*. Laŭ iuj –burĝoj kaj stalinistoj, plian fojon miksitaj– la "bona povo" estis ĉe la *Generalitat* kaj reprezentis la respublikanan legitiminecon, kaj ties politiko respondis la karakteron de la milito, kiu estis okazanta: milito por la defendo de la demokratiaj institucioj de la Respubliko, minacitaj de la faŝista atako.

Laŭ aliiuj, t.e. finfine laŭ la nostalgiemuloj kaj arkivistoj pri la "bona revolucia tradicio", estis ĉe la Komitato de Milicoj, kie kuŝis dum tro mallonga tempospaco la "bona revolucia povo" (se tiu ne daŭris, ĉu eble tio estis kaŭze de la eterna demando pri la "revolucia gvido"?). Laŭ tiuj lastaj ne fortikigi (ĝis kiom?) la Komitaton de Milicoj estis perfido, akcepti ties dissolvon kaj ties faktan integradon en la *Generalitat* estis abdiko. Ĉe la forlaso de tiu "bona povo" radikas la fiasko de la revolucio.

Laŭ ĉiuj "marksistaj-leninistaj" ideologiistoj la demando pri la povo klarigas ĉion. Kia estas la "klasa enhavo" de la povo? Kiu klaso estas ĉe la povo? Tie estas ĉio. La resposto tamen estas tute simpla: *ĉiu klaso ĉe la povo estas ekspluatanta klaso*, ĉu ties vestoj estas "burĝaj" aŭ "proletaj". La socia deveno de la kamaradoj ministroj kaj de la politika-ŝtata burokrataro modifas nenion al la demando, ĉar la laboristoj siavice restas katenigitaj de sia memseniganta laboro kaj kondamnitaj al la rolo de nuraj efektivigantoj.[60]

Memkompreneble oni ne rajtas riproĉi la Komitaton de Milicoj pro tio, ke ĝi ne estiĝis el ia "demokratia balotado". Je la situacio de Katalunio dum julio de la 1936a estis ĝusta, malgraŭ ĉio, ke laboristaj gvidantoj prenu tiajn iniciatojn. La Komitato de Milicoj adoptis aranĝojn, kiuj estis utilaj kaj necesaj je la fruaj tagoj post la venko sur la militistoj. *Sed la iniciato de la amaso, la aranĝoj utilaj kaj necesaj, kiujn la amaso improvizis, estis multe pli progresemaj kaj celis multe pli antaŭen laŭ ĉiuj vidpunktoj ol tiuj de la staboj de la laboristaj kaj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj*, kiuj dum mallonga tempospaco estis kunigataj ĉe la Komitato de Milicoj.

---

60 Pri tiu ĉi koncepto pri la povo oni vidu la 5an aneksaĵon.

Finfine tio estas, kio laŭ mi estas pli grava. La revolucio vivis ĉe la spontanea movado de la amaso, ne ĉe la Komitato de Milicoj nek poste ĉe la *Generalitat*. La Komitato de Milicoj iris malantaŭen de la reala movado, kiun ĝi klopodis kontroli, kanalizi kaj, per unu sola vorto, bremsi. Inter ĝia agado, ekde julio ĝis la 3a de oktobro, kaj tiu de la *Generalitat*, dum la sekvantaj monatoj, estis neniu disrompo. Ambaŭ, kiel organoj de la povo, situiĝis antaŭ la amasa movado samkiele: ekstere kaj supre.

Ĉe la Katalunio de julio-aŭgusto de la 1936a la ŝtato estis dispecigata, atomiĝanta je mil povoj. Ĉiuj politikaj kaj sindikataj burokrataroj sentis la danĝeron, ili estis "for de ludo", ili estis senutiliĝontaj. Ili interkonsentis krei denove centralizitan povon (kvankam ili kverelis por kontroli ĝin) kaj rekonstrui la hierarĥian piramidon ĉe la politika, militista, ekonomia, polica ktp kampoj, modifikante laŭ sia profito la erojn de tiu piramido (la sindikata kaj politika burokrataro anstataŭis ofte la malnovan administran kaj ŝtatan burokrataron, ekzemple). Iuj el tiuj burokrataroj konscie kaj senskoncie la aliaj klopodis unue kaj atingis poste restarigi la ŝtaton.

La Komitato de Milicoj jam estis provo tiucele. Du monatoj poste ĝi fariĝis senutila, ĉar estis la samaj organizaĵoj, kaj foje la samaj homoj, kiuj konsistigis la *Generalitaton*, kun la samaj prerogativoj kaj la samaj roloj kaj krome kun la respublikana legitimeco.

Tamen tio, kion mi ĵus skribis, donas al ni nur skiza rigardo pri la realo. La forto de la amasa revolucia movado estis tia, la sociaj transformoj, kiujn tiu ĉi iniciatis, tiom gravaj, ke la Komitato de Milicoj, kiel poste la *Generalitat*, dum iu tempospaco montriĝis senutila, sensignifa, ĝi kreis organon post organo kaj publikis dekreton post dekreto, kiujn neniu –aŭ preskaŭ neniu– estis atentontaj: farendis aferoj multe pli gravaj.

La aŭtoritato ekzistis laŭjure, tamen la rilato al la aŭtoritato ne estis obeema rilato, sed plenkontraŭe. Kaj la ne rekonata aŭtoritato ŝanceliĝis inter kapturniĝo kaj kolero.

Jes, oni rajtas paroli pri sovaĝa demokratio¸ (samkiel ni parolas pri "sovaĝa striko") por nomi la novan socian vivon, kiun starigis ĉe Katalunio la armitaj laboristoj.

Mi deziras ne fali miavice en la "maldekstreman" fetiĉismon, tamen ŝajnas al mi, ke la disvolviĝo de tiu sovaĝa demokratio estus povinta naski formon de socia organizo kiel iun federacion de konsiloj (tio estas nura *rimarko*; ĉar mi ne verkas kuirlibron, mi ne necesas doni receptojn). Por tio estis esencaj kaj konkretaj faktoj: 70% el la entreprenoj kolektivigitaj, plurnombraj kamparanaj komunumoj, laboristaj milicoj, neniigo de la malnovaj policaj korpusoj, revoluciaj komitatoj ĉe la entreprenoj, ĉe la kvartaloj, ĉe la urboj kaj vilaĝoj, kontraŭautoritatema "nova anima stato", transformoj ĉe la ĉiutaga vivo, ĉe la situacio de la virinoj ktp.

Se ne okazis tio, kaj se –kiel ni vidos– okazis plurmonata lukto inter la povo (unue la Komitato de Milicoj, poste la *Generalitat*) kaj tiu sovaĝa demokratio, tion kaŭzis senfino da kialoj, kiuj devenas de la historia kaj socia konteksto: la milito –

memkompreneble–, sed ankaŭ la rolo ludita de la laboristaj organizaĵoj –de ĉiuj la organizaĵoj– kaj la fideleco, oni preskaŭ rajtas diri submetiĝo, de la aktivuloj al ties organizaĵoj kaj gvidantoj. Precize pere de la organizaĵoj –inkluzive de la liberecana CNT-FAI– estis "reenkondukata" la povo, resanktigata la aŭtoritato, trudata la disciplino, militistigataj la milicoj, restarigata la socia hierarĥio kaj venkata la revolucio.

> *"Kiel ĉe ĉiuj antaŭaj ribeloj de laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj", verkas tre prave* Living Marxism*, "la plej ĉefa fakto estas tio, ke la hispanaj amasoj estis pli radikalaj, pli 'maldekstremaj', pli ekstrememaj ol siaj gvidantoj kaj ol la organizaĵoj, kiujn tiuj ĉi lastaj kontrolis. Ne temas pri tio, ke la amasoj agis kontraŭ siaj organizaĵoj, nek pri tio, ke ili vidis barilon inter si kaj siaj organizaĵoj, tamen la politika ŝanĝo okazinta ekde tiam, kiam la revolucio transformis la konsistigon de la nova reĝimo, demontras sufiĉe, ke inter la agantaj amasoj kaj ties organizaĵoj estis malakordo pli granda ol tio, kion la laboristoj povis imagi. La agoj de la amasoj dumsomere kaj jarfine de la 1936a, kiujn partoprenis tiel la organizitaj kiel la neorganizitaj laboristoj*[61]*, ne estis decidataj nek gvidataj nek disvolvataj de la oficiala gvidantaro de la pluraj organizaĵoj –inkluzive de anarĥiistaj sindikatoj–, sed de la laboristoj mem kaj de la cirkonstancoj, antaŭ kiuj –gviditaj aŭ ne– ili reagis". Kaj pli antaŭen: "Tion, kio estis aŭtentike revolucia ĉe la hispana intercivitana milito, kaŭzis la rekta ago de la laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj, kaj ne iu specifa formo de sindikata organizo aŭ la ago de iuj aparte brilaj ĉefoj. Tamen oni devas aserti, ke la pli granda libereco, ekzistinta ĉe la malmulte centralizitaj anarĥiistaj sindikatoj, spegulis multe pli aŭtonoman iniciatemon ĉe la anarĥiistaj laboristoj. La revoluciaj atingoj de la spontanea ago de la hispanaj laboristoj dum la tagaĵoj de julio estis neniigataj, kiam la dekretoj, la decidoj de la partioj, la registara aŭtoritato anstataŭis la aŭtonoman agon de la proletaro, kaj kiam la tuta renovigita maŝinaro komencis kontroli la amasojn."*[62]

Mi aldonas nenion.

61 Kvankam sektoro de neorganizitaj laboristoj partoprenis la lukton de julio de la 936a, baldaŭ la sindikataliĝo fariĝis deviga –kaj krome necesa, ekzemple por sin provizumi

62 *Living Marxism*, n-ro 4a (6an de aprilo de la 1939a). Ĉikago, Usono.